Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803

Manuskriptoj nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en part-pagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj) Ponumere 45 g (1 prk).

Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 8/9 (145/146) Korneuburg ĉe Wien, la 24. aŭgusto 1937. 14. jaro

Jubileo-Kongreso en Varsovio.

La kongreso, al kiu aliĝis 1100 personoj, sukcese finiĝis.

Honora prez. kaj prez. estis prof. d-ro Bujwid, vicprez. Paul **Nylén** (Svedujo), generalo **Bastien** (IEL), **Lininger** (UEA), prof. d-ro Yagi (Japanujo); ĝen. sekr. **Hartmann** (Warszawa) kun helpantoj.

La 7. **aŭg.** estis kunsido de Int. Porkongresa Komitato kaj LKK; vespere „Internacia Vespero“ en granda kafejo kun muziko, danco ktp.

La 8. **aŭg.:** Diservoj en katolika kaj protestanta preĝejoj. En la katolika preĝejo diris la sanktan meson P. Rotondo fu Michele el Bari (Italujo) kaj Franciskana Patro prof. Modesto Carolfi el Cortemaggiore (Italujo) faris bonegan predikon, kies teksto sekvas:

Dom. XII. Post Pent. S. B. X. 25—37.

...kaj jen leĝisto stariĝis kaj tentis lin dirante: Majstro, per kia farado mi heredos eternan vivon? kaj Li diris al li: kio estas skribita en la leĝo? kiel vi legas? — kaj li respondante diris: Vi amu la Sinjoron, vian Dion, per via tuta koro, per via tuta animo, per via tuta forto kaj per via tuta intelekto kaj vian proksimularon kiel vin mem. Kaj li diris al li: Vi prave respondis: tiel faru kaj vi vivos. Sed li, deziranta sin pravigi, diris al Jezuo: kaj kiu estas mia proksimulo?“ Jezuo respondis kaj diris: „Homo malsupreniris de Jeruzalemo al Jeriko kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj senvestigis lin, batis lin kaj foriris, lasante lin duone senviva.“

Okaze pastro malsupreniris la saman vojon kaj, vidinte lin, li preterpasis. Kaj sammaniere levido, ankaŭ veninte al la loko kaj vidinte lin, preterpasis aliflanke. Sed Samariano vojaĝante alvenis, kie li estis, kaj ekvidinte lin, li estis kortuŝita, alproksimiĝis kaj bandaĝis liajn vundojn, enverŝante oleon kaj vinon; kaj li metis lin sur sian beston kaj kondukis lin al gastejo kaj zorgis pri li. La morgaŭan tagon li elprenis du denarojn kaj donis ilin al la gastejestro dirante: „zorgu pri li, kaj kiom pli vi elspezos, kiam mi revenos, mi repagos tion al vi. Kiu el tiuj ĉi tri ŝajnas al vi fariĝi proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj? — kaj li diris: tiu, kiu kompaton faris al li.“ Kaj Jezuo diris: „Iru vi kaj agu same.“

La aserto, kiu diras, ke le sankta Skribo havas ĉiaman aktualecon, ne estas strangaĵo. Eble iu malamiko, iu nekompetenta, kiu volas kontraŭi nian ideon, povus diri: kion vi povas trovi por vi, por via idealo en la hodiaŭa Evangelio? Nenio! Ne, mi tuj respondos, mi povas trovi pli ol vi povas pensi aŭ imagi.

Esperanto estas la Samariano, kiu flegas la vundojn de la vundito aŭ pli bone de la vunditoj, kiuj estas la diversaj lingvoj. Vi certe scias, ke nuntempe la naciaj lingvoj, por pli facile, pli rapide esprimi la aferojn, uzas la barbarismojn kaj tiel ili vundas la lingvan purecon kaj lasas ĝin survoje vundita, kiel la rabistoj lasis la iranton. Pasas la pastroj de la lingvo, kiuj estas la poetoj, la verkistoj, sed ili ne atentas pri la vundita lingvo kaj ili sekvas la vojon; pasas la birdoj, tio estas la legantoj, sed ankaŭ ili donas nur rigardon al la vundito kaj preterpasas. Pasas Esperanto kaj tuj sin okupas pri la vundito kaj donas sin mem, por flegi la vundojn kaj resanigi la lingvon, ĉar ĝi povas interkompreniĝi kun ĉiuj, sen vundi iu ajn nacian linvon.

De md: kort. kons. Steiner (Vieno), P. Rotondo (Bari), generalo Bastien (Paris), prof. Bujwid (Kraków).

Meto de florkrono al la tombo de „Nekonata Soldato“.

Sed krom tio ni esperantistoj ·spertas, ke inter ni regas reciproka amo. Ni ne atentas nek pri nacio, nek pri religio, nek pri raso, sed ni helpas nin unu la alian laŭ niaj fortoj, niaj eblecoj, kaj tio estas laŭ la Evangelio.

Ni devas esti la Samarianoj de la societo, kiu forpelis la amon. La nuna societo, vi, miaj gekaruloj, povas tion facile konstati, la nuna societo estas treege vundita. Ni ĉie vidas malamon, malpacon, batalon; ni devas klopodi, por resanigi la societon, enkondukante sur ĝi kaj en ĝi la oleon de l'amo.

Estas tiel bele, tiel poete, ami unu la alian, helpi sin reciproke kiel fratoj!

Do ni devas klopodi, ke precipe inter ni esperantistoj ne regu malpaco, ne regu malkonsento, ĉar se ni devas diri, ke nia lingvo estas paca ilo, ke ĝi estas taŭga, por pacigi la societon; kielmaniere la homoj kredos tion, **se ili vidas, ke inter ni estas malpaco, ke ni ne kapablas interkonsenti eĉ en lingvaj aŭ pri lingvaj aferoj! Do, miaj gekaruloj, se ni volas esti la fermentiloj, la kuraciloj de la malsana kaj vundita societo, ni devas klopodi, forigi inter ni la malkonsentojn, la malpacajn diskutojn kaj tiel doni al la societo, al la tuta mondo la bonan ekzemplon!**

Sekvis **meto de florkrono** en Palaco Belweder, kie Marŝalo J. Pilsudski siatempe loĝis.

Je la 12 h **Solena Malfermo** de la Kongreso en bela salonego de Filharmonio. Parolis aŭ nur ĉeestis la oficialaj reprezentantoj de la registaroj de:

Aŭstrio	legacia konsil. grafo Attems
Sud-Aŭstralio . . .	s-ano Couche
Belgujo	f-ino Jennen
Bulgar. (Instruminist.)	Cyril Stoikov
(Komercminist.)	s-ano Krestanov
Finnlando	s-ano Setälä
Liechtenstein	s-ano Hans Jakob
Mexiko	alvenis telegramo
Nederlando	s-ano ing. Isbrücker

La kontraŭuloj asertas,

ke Esp. ne havas animon. Ni pli bone scias tion. La pure teknika ĝuas pli grandan ŝaton ol la animhava. Se Esp. estus nura maŝino, delonge ĝi estus ĝenerale akceptita.

Norvegujo . . . . . s-ano kapit. Bugge-Paulsen
Papuo . . . . . s-ano d-ro Williams
Polujo . . . . . Ministro Piestrzynski
Brazilio . . . . . alvenis letero

La franca, egipta kaj hajtia registaroj petis raporton pri ĵa kongreso; same Ligo de Nacioj.

Jen la parolado de la aŭstria reprezentanto:

Tre estimata s-ro prezidanto!

La aŭstria ministro je sia granda bedaŭro ne povas partopreni hodiaŭ, ĉar li estas for je formpermeso. Mi tial kiel aŭstria afergvidanto havas la honoron kaj ĝojon, anstataŭante la ministron, veni en vian solenan malfermkunsidon.

Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio, havis en la pasinta jaro la grandan plezuron, saluti la esperantistaron okaze de la Universala Kongreso kaj mi estas certa, ke ankaŭ Via Jubileo-Kongreso je granda peco antaŭenpuŝos vian movadon, per kiu vi deziras servi al la mondo.

Kaj je la fino de miaj vortoj afable permesu, ke mi deziras plej grandan sukceson al via movado, al kiu la gvidantaj ŝtatistoj de Aŭstrio montris sian intereson kaj favoron."

Post tiuj bele legitaj vortoj sekvis granda aplaŭdo. Grafo Attems estis la sola profesia reprezentanto de registaro, kiu parolis.

Je tiu okazo mi deziras aldoni, ke laŭ mi kaj multaj personoj ne decas, se esperantistoj parolas nome de sia registaro kaj miksas la oficialan saluton kun pure. E.-aferoj. Ili ĉiam pripensu, ke ili devus respondeci siajn vortojn antaŭ sia registaro. Ĉu ili vere povus tion? Ĉe venontaj kongresoj oni atentigu la samideanojn-registar-reprezentantojn pri tio!

Sekvis la paroladoj de gen. **Bastien** (IEL), **Lininger** (UEA), **P. Rotondo** (IKUE), **d-ro Robin** (TEKA), **Toczynski** (Skoltoj), kapitano **Silhan** (UAB), **Bodziachowski** (Frateca Movado) kaj **Steiner** (Aŭstriaj Fervojoj):

Steiner transdonis salutojn kaj laŭtlegis jenajn leterojn:

La Prezidanto
de la Administrarkomisiono de
Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj

Wien, 3. aŭgusto 1937.

Al la tre estimata prezidantaro de la Jubileo-Esperanto-Kongreso

Warszawa.

Estante fervora akcelanto de la Esperanto-Movado mi permess al mi en mia eco kiel prezidanto de la Administrarkomisiono de Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj saluti la Jubileo-Mondkongreson en Varsovio plej kore.

Je ĉe tiu okazo mi kun plezuro memoras la belan Esperanto-Mondkongreson en la pasinta jaro en Vieno, je kiu partopreni mi havis la plezuron estante Ministro por Komerco kaj Trafiko.

Mi deziras al viaj kongreslaboroj la plej bonan sukceson kaj salutas vin ĉiujn plej kore, speciale la nestoron de via movado s-ron universitatan profesoron d-ron Odo Bujwid, kun kiu mi jam konatiĝis dum la Internacia Konferenco 1934 en Vieno.

Kun la esprimo de mia plej alta respekto

Fritz Stockinger.

Generaldirekcio
de Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj
Generalsekretariejo.

Wien, la 5. de aŭgusto 1937.

Al la Jubileo-Esperanto-Kongreso

Varsovio.

La Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj jam en la jaro 1923 permesis la portadon de la Esperanto-insigno dum la deĵoro kaj faris en la Konferenco de la Eŭropaj Fervojadministraroj en Bruselo 1927 la proponon, ke en la translimaj kupeoj ankaŭ surskribo-ŝildetoj en la mondhelplingvo estu allasataj. Ĉi tiu propono estis akceptita.

Ĉe nia administraro same kiel por la naciaj lingvoj okazas ekzamenoj ankaŭ por Esperanto kaj krome ĉiujare ripetekzamenoj kaj la konduktoroj portas dum la deĵero, se ili regas la Esperanto-lingvon, ŝildeton kun la surskribo „Esperanto".

Ni krome ankaŭ ĉiam helpis al Esperanto, kursoj estis rekomenditaj al niaj subuloj kaj ankaŭ gviditaj en lokoj, apartenantaj al la fervoj-administraro.

Al la Jubileo-Kongreso ni deziras la plej bonan sukceson kaj ni invitas la kongresanojn, veni dum la revojo tra Aŭstrio.

Kortega Konsilanto Hugo Steiner, kiu faris ĉiujn iniciatojn koncerne Esperanton ĉe la Federaciaj Fervojoj, transdonos al vi ankaŭ buŝe niajn plej bonajn gratulojn.

Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj:
La ĝeneralsekretario: d-ro Krogner.

Poste **Steiner** (Wien) daŭrigis nome de Aŭstria E.-Asocio kaj de Intern. Esp.-Muzeo, de kiu li estis alportinta la flagon de la unua E.-Kongreso, kiu trovis lokon antaŭ la prezidanto tablo. Steiner klarigis, kiel estiĝis la E.-flago.

Sekvis: Aŭstralio (Couche), Britujo (Long), Bulgarujo (Krestanoff), ČSR. (Bloch) kaj Germana Ligo en ČSR. (Gahler), Danlando (Egerup), Estonujo (Dresen), Finnlando (Setälä), Francujo (Couteaux), Hungarujo (Mihalik), Italujo (Carolfi), Japanujo (Nakahara), Jugoslavujo (Radošević), Nederlando (Mooij), Norvegujo (Rose Bye), Papuo (d-ro Williams), Svedujo (Malmgren), Svislando (d-ro Spielmann), Usono (Dorman), Polujo (prof. Bujwid), Ukrainio (Reznyk), Hebreoj (Lejzerowics), Negroj (Kola Ajaba), Nansenhelpo (Stepp-Bowitz), Pola Kooperativa Komitato (Zawada).

Posttagm. **Malfermo de XIV. Kong. de Univ. Asocio de Blindaj Organizaĵoj** (UAB); prelego de J. Glück (Amersfoort) „Zamenhof kiel scienculo kaj filozofo"; Malfermo de Jubilea Ekspozicio kaj vespere **Festo de la Veteranoj.** La festparoladon faris **Julio Baghy,** poste okazis la disdonado de la diplomoj kaj de la arĝentaj kaj oraj steloj. En Aŭstrio ricevis ilin: R. Čech, E.-Soc. „Danubio", A. Deistler, d-ro A. Engländer, Carla Jacobsen, d-ro H. Jokl, Hedwig Kaes, R. Kaftan, A. Krtsmary, M. Lackenbacher, d-ro E. Pfeffer, O. Popper, Emma Raff, J. Schamanek, F. J. Schade, K. O. Sikor, O. Simon (la sola „ora"), d-ro H. Sirk, Hugo Steiner, O. Zimmermann.

9. aŭg. meto de florkrono ĉe la tombo de la nekonata soldato; **Soleno ĉe la tombo de l' Majstro.**

Per Radio disaŭdigata kaj por la ĉeestantoj per laŭtparolilo aŭdebla parolis generalo **Bastien,** sekvis parolado de la **rabeno** kaj poste preteriris la samideanoj, arigitaj laŭ la landoj, la tombon ĵetante po unu floron al la tombo dume la reprezentanto de la lando parolis kelkajn vortojn. Por Aŭstrio parolis kort. kons. **Steiner:** „Aŭstrio, kie ni por eternaj tempoj starigis monumenton al vi, kara Majstro, en Internacia Esperanto-Muzeo, salutas vin."

Poste okazis vizito al la **tomboj de Felix kaj Leono Zamenhof,** la fratoj de l'Majstro.

Sekvis **Soleno ĉe la tombo de Antoni Grabowski.** Ĉe la tombo parolis vere emociigite Julius Glück belegajn vortojn pri Grabowski, skizante la tutan verkadon kaj vivon de tiu ĉi eminenta kunlaboranto de Zamenhof.

Sekvis **laborkunsidoj de IEL kaj UEA.**

Vespere **Teatro** en Operejo. Oni prezentis unuaktaĵon „Consilium Facultatis" en Esp., sekvis kantoj de opergekantistoj Bender, Golebiowski kaj s-ino Szreltenówna kaj 4 s-inoj „Tiuj kvar". Je la fino estis baledo „La geedziĝfesto en Ojkusc". La du lastaj eroj de la programo estis speciale bonegaj.

10. aŭg. fakaj kunsidoj, prelegoj de **J. Major** (Shanghai) „Pri ekstremoriento", **P. Carolfi** (Cortemaggiore) „Italaj vidindaĵoj" kaj **V. Setälä** (Helsinki) „Pri amatora kaj arta fotografado"; **laborkunsido de IEL** kaj **Literatura Vespero,** aranĝita de Literatura Mondo.

11. aŭg. ekskurso al Bialystok, vizito de la naskiĝdomo de l'Majstro kaj de Zamenhof-strato; akcepto de reprezentantoj en la urbdomo.

12. aŭg. fakaj kunsidoj, prelegoj de **Krestanoff** (Sofia) „Bulgarujo, la lando de rozoj kaj centjaruloj", **Setälä** (Helsinki) „Figuraj esprimoj en Esp.", **K. M. Lininger** (Bern) „Svislando", **J. Glück** (Amersfort). Vesp. **„Gaja Vespero"** sub gvidado de s-ano Kurjanski.

13. aŭg. fakaj kunsidoj, prelegoj de **d-ro Musella** (Roma) „La pontinaj marĉoj kaj ilia kulturado", **B. Long** (London) „London, brita ĉefurbo", **d-rino Ender** (Warszawa) „Polujo — lando de kulturo"; **laborkunsidoj de IEL kaj UEA; Internacia Balo** en la granda salonego de la urbdomo.

14. aŭg. Ferma kunsido kun alparolado de d-ro **Adam Zamenhof, ke IEL kun UEA intertraktis, ke ne plu okazos iuj tako, por ke utila laboro estu ebla.** Sekvis **raportoj de UEA kaj IEL** kaj fine oni akceptis inter aliaj rezolucioj ankaŭ ĉefe tiun de **TAGE** pri **„Enkonduko de Esp. kiel devigan fakon en la lernejojn".** Per la himno la **Kongreso** finiĝis.

Ni devas danki al LKK pro ĝia granda laboro kaj klopodado kaj, se iu s-ano deziras kritiki pri unu aŭ alia malgrandaĵo, li ĉiam pensu, kian grandan servon LKK faris dum multaj monatoj al li. Unuavice ni danku al prof. Bujwid, kiu devis forigi diversajn malagrablajojn, al ĝen. sekr. Hartman pro lia grandioza laboro (li estis la animo de la kongreso), al afabla prez. B. B. Wyszynski, kasisto Lubliner kaj ties anstataŭantino Halina Weinstein kaj al ĉiuj aliaj helpantoj.

Ili akceptu koran dankon pro ilia sindediĉo al la multspecaj, nervostreĉaj laboroj de la kongreso.

Ĉiun tagon, eĉ ĝis meznokto, okazis la kunsidoj de la Komitato de IEL.

D-ro Adam Zamenhof deziris montri al mi sian belegan filmon pri la pasintjara Kongreso en Wien kaj pri la vojaĝo tra Aŭstrio. Do antaŭ la balfesto kelkaj invititaj personoj ĉeestis vespere la prezentadon de la filmo. Poste sekvis tetrinkado kun bonegaj dolĉaĵoj, fruktoj ktp. — La belegan vesperon ĉeestis d-ro Adam kun edzino kaj filo, d-rino Zofia kaj Lidja Zamenhof kaj kuzino s-ino Hermelin, krome la aŭstria afergvidanto de la ambasadorejo grafo Attems, prof. Bujwid, Paul Nylen, inĝ. Isbrücker kun filino, J. Glück ges. Holmes, d-ro Spielmann, lernejestro Huber kaj f-ino Hojtasch (ambaŭ el Aŭstrio) kaj mi.

Steiner.

XXX-a Universala Kongreso.

London, 26. julio—6. aŭg. 1938.

LKK: E. W. Amos, f-ino R. A. Davey, W. A. Gething, f-ino E. C. Goldsmith, C. C. Goldsmith, H. W. Holmes, B. E. Long, A. C. Oliver, F. E. Wadham, s-ino E. Warren, R. B. Wilkinson.

Prez. de LKK f-ino Davey, **sekr.** C. C. Goldsmith, **helpsekr.** Amos kaj f-ino Goldsmith.

Kotizo ĝis 31. de dec. 1937 anglaj £ 20.—, poste altigos ĝis 30.

Provizoraj **aliĝiloj** haveblaj ĉe Int. Esp.-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo.

Ni jam nun preparas karavanon al la 30-a. Ni intencas aranĝi la vojon jene: Rapidtrajno Wien — Passau — Nürnberg — Frankfurt ĉe Main (vizito de la interesa urbo) — Köln (vizito) — Aachen (vizito) — Bruxelles (vizito) — Ostende (vizito) — London (restado 7 tagojn) — sur revojo — Bruxelles — Gent (vizito) — Brügge (vizito) — Aachen — Frankfurt — Nürnberg — Passau — Wien. Daŭro de la tuta vojaĝo 14 tagojn. La prezo ne ankoraŭ estas fiksita, sed tre malalta koncerne la grandan vojaĝon.

Ankaŭ eksterlandanoj povos partopreni. Informojn kontraŭ respondkupono.

La partoprenontoj jam nun povos enpagi iun monaton al ni sumon, kiun ni por vi deponos en ŝparkaso.

Aliĝis: 1. Steiner, 2. E. Hojtasch, 3. H. Huber, 4. L. Russmayr.

E.-Varbadservo por Aŭstrio: Steiner.

INTERSTATA ESPERANTO-AKORDO
pri la
ENKONDUKO de ESPERANTO
en la lernejojn.

Malgranda verketo de d-ro Antoni Czubrynski, docento ĉe Libera Universitato en Varsovio, eldonita de LKK de XXIX., Warszawa 1937.

Sed tre grava! Ĝi temas pri instigo de la instruministerioj en kelkaj landoj al la promeso, ke ili enkondukos Esperanton en ĉiujn siajn lernejojn devige, se ankoraŭ 5 aliaj ŝtatoj promesos la samon.

Sed grava antaŭlaboro estu farota en multaj landoj kaj por ilin plenumi kaj prepari la agadkampon en la landoj, oni petis kelkajn s-anojn, transpreni ĉi tiun gravan taskon. Por Aŭstrio oni petis min kaj mi nun petos kelkajn s-anojn al kunhelpo. Steiner.

Oficialaj poŝtkartoj kun Esperanto-teksto.

La Nederlanda Poŝto eldonis novan serion de oficialaj poŝtkartoj kun surpresita poŝtmarko por eksterlanda uzado. La klarigaj tekstoj de la bildoj estas en nederlanda lingvo kaj Esperanto. La serio konsistas el 24 kartoj kun diversaj bildoj. La tradukon faris Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en Haag.

Kiel konate en la pasinta jaro la Aŭstria Poŝto eldonis serion da 50 diversaj oficialaj bildpoŝtkartoj por la eksterlando. La klariga teksto estas en germana, angla, franca lingvoj kaj en Esperanto. La tekstojn en ĉiuj menciitaj lingvoj prizorgis kortega kons. Steiner de Intern. Esperanto-Muzeo en Wien. La tuta serio havebla kontraŭ alsendo de 32 intern. poŝtresp. kup. — Po 10 por 7 resp. kup. de Int. E.-Muzeo, Wien

La Dana Reĝo ĉe Esperanto-stando.

La reĝo de Danujo vizitis la ekspozicion en Skanderborg kaj estis pli longan tempon ankaŭ ĉe la E.-stando, kie li interesiĝis pri Esp. — Li petis pri vortaro, kiun li kunprenis sub sia brako.

Bonegaj aŭtoŝoseoj ĝojigas la aŭtomobilistojn en Aŭstrio.

La fama ŝoseo trans Großglockner (2571 m).

Depost 50 jaroj Radio.

Dum julio la Radio-tekniko festis la oran jubileon, ĉar en julio 1887 la juna profesoro de fiziko en Teknika Alternejo en Karlsruhe **Josef Hertz** konstatis la unuan fojon en sia laboratorio la ekziston de la nevideblaj ondoj, kiuj trarapidas la eteron sen drato aŭ aliaj materiaj rimedoj. En la palaco de la inventoj en Paris-a Mondekspozicio nun estas montrata la unua aparato, per kiu Hertz produktis la ondojn, kiuj ricevis sian nomon laŭ li. Hertz konstruis tiam tute primitivan aparaton, kiu estas rigardata kiel unua radioaparato. Ĝi konstistis el ringforme tordita kuprodrato.

Tri jarojn poste, en 1890, la franca sciencisto profesoro **Branly** plibonigis ĉi tiun aparaton, en 1893 la angla fizikisto **Lodge** la unuan fojon supozis, ke Radio ebligos la senfadenan telegrafadon. En 1895 la rusa fizikisto **Popow,** al kiu la scienco dankas la unuan antenon, sukcesis aranĝi Radiorilaton inter du urboj, Petersburg kaj Kronstadt. La tiam ankoraŭ juna inĝeniero **Marconi** plukonstruis la inventaĵon de Popow, tiel, ke li jam kapablis senfadene telegrafi en distanco de pli ol 100 km. En 1901 oni atingis rilatojn trans 300 km kaj per tio komenciĝis la epoko de la praktika uzado kaj komerca ekspluatado de ĉi tiu genia invento.

Itala Radio kaj Esperanto.

La Ministerio por la gazetaro kaj Propagando en Roma publikigas en Esperanto la rezultojn de la III-a Konkurso inter Radio-amatoroj de „Italaj Turismaj Kronikoj", la oficiala organo de la supre mencita ministerio.

Laŭ ĉi tiu s-ano De Martelaere en Gent, Belgujo, ricevis la unuan premion por konkursaĵo „Venecio", redaktita en lingvo Esperanto, kaj la duan premion Esperantan d-ro Wilhelm Solzbacher, Luxemburg, por „Multaj vojoj kondukas al Romo".

La Generaldirekcio por Turismo malfermos la 28. okt. 1937 la **IV-an Konkurson,** kiun devos partopreni la tuta Eŭropa esperantistaro. La informojn vi ricevos en la venonta numero de nia gazeto aŭ vi skribos al „Direzione Generale per il Turismo", Via Vittorio Veneto 56, Roma kaj samtempe petas je senpaga alsendo de la semajnaj „Italaj Turismaj Kronikoj" aŭ iu ajn teksto el la disradiigitaj paroladoj aŭ de la broŝuro „Hotel- kaj Benzin-kuponoj por la fremduloj en Italujo" aŭ de la baldaŭ aperonta luksa libreto „La kvar sezonoj en Italujo", ĉiuj en Esperanto.

La supre menciitaj konkursaĵoj eble estos publikigataj en AE.

El **Radio-stacioj** Athlone (531 m), Dublin (223 m), Cork (242 m) en Irlando la 22. aŭg. okazis dissendo en E. pri Irlando. Skribu al Radio-stacio Athlone, por ke ĝi regule sendu novaĵojn.

Esperanto en la lernejoj.
Ministrejo de Klerigo
Sekcio por mezlernejoj
Nro 5690/II 1937.

Al Jugoslavia Esperanto-Ligo
Zagreb.

Rilate vian memorandon de 12. jan. 1937, direktitan al s-ro Prezidanto de la Ministraro, la Ministrejo por klerigo havas la honoron informi vin, ke la deziroj de la Ligo estos konsiderataj, kiam en la diskuton venos la problemo pri reformo de la instruplano kaj programo por niaj mezlernejoj.

Laŭ la ordono de la Ministro por klerigo
Ĉefo de la sekcio por mezlernejoj.

La nuna stato de E. en Portugalujo.

La nuna portugala registaro pensas nun la lingvon bolŝevika kaj malpermesas ĝian instruon kaj publikan propagandon.

Madrida registaro dissendis perradie militajn noticojn en E. Post informiĝo pri la E.-movado en la lando, la portugala registaro konstatis, ke el 14 E.-asocioj en la urbo 13 estis laboristaj.

Jen la ebla motivo de la kontraŭstaro kaj de la fermigo de la asocioj. Mi kredas la decidon provizora kaj, kiam la hispana milito kvietiĝos, la simpatio al E. denove sin manifestos en la superaj instancoj sen plua hezito. Saldanha Carreira.

Okazo helpi anglan propagandon.

Ne-angloj refutu Basic English.

Kvankam Basic English nuntempe ne multe estas propagandata en Anglujo, tamen aperis en artikol-serio en la granda gazeto „The Star" (eldonnombro 625.000), en kiu verkisto komandanto King-Hall

---

La vera esperantisto devas manifesti ĉiam kaj ĉie la internan ideon de Esperantismo, tio estas, devas esti liberema, tolerema, pacamanta, homamanta, delikata, respektplena, ĝentila, bonedukita, konkordema, verema, honesta, unuvorte — noblesentulo.

Ne ĉiuj, kiuj scias Esperanton, estas esperantistoj, same kiel ne ĉiuj, kiuj scias la anglan lingvon, estas angloj.

(Gazeto de Ameriko.)

antaŭvidas Basic English, kiu faros post du generacioj grandan utilon al Anglujo.

Nun antaŭ la XXX-a estas grave montri al la gazetaro, ke Esperanto estas la estonteco kaj ne Basic-English. Skribu en tiu senco al Komandanto Stephen King-Hall ĉe „The Star", Borverie Str., London

Int. Gazetservo de BEA: E. D. Durrant.

INFORMOJ EL AŬSTRIO

NI PLUKONSTRUAS!

Jen la titolo de belega 74-paĝa kajero, 30 × 27 cm, kiun jus eldonis Aŭstria Federacia Kancelierejo („Heimatdienst" — „Servo al la Hejmlando") okaze de la tria datreveno de la martira morto de kanceliero d-ro Dollfuß, pri kiu la partoprenintoj en la Internacia Konferenco „Esperanto en la lernejon kaj trafikon" bone memoras. Li estis bonkora homo, kiu havis por ĉiu homo bonan vorton kaj estis **ĉiam al ĉiu** helpopreta!

La kajero kun multaj belegaj bildoj montras la konstrulaboron, faritan en Aŭstrio dum la lastaj 3 jaroj dum la kancelihereco de d-ro Kurt von Schuschnigg.

Interesaj estas kelkaj eldiroj:

Pri Dollfuß: „Lia misio estis luktado, lia volo estis paco, lia vivo estis ofero, lia mortado estis venko."

Devizo de d-ro von Schuschnigg: „La vojo kiun ni iras, estas unusignife klara kaj neŝanĝebla; ni ne serĉas la vojon triumfan, ni ankaŭ estas pretaj, se necesos kaj la sorto tion postulos, venki pecon da pasiono-vojo; sed ni ĉiam restos sur Engelbert-Dollfuß-Ŝoseo, pri kiu ni scias, ke ĝi kondukas al la sociala rajto kaj al la sociala paco, al la popolkomuneco de la profesiaj korporacioj en la libera Aŭstrio."

Eldiro de Dollfuß: „Ni rifuzas egaligon kaj teroron. Ni volas la socialan, kristanan, germanan ŝtaton Aŭstrio sur profesi-korporacia bazo sub forta aŭtoritata gvidado. Ni deziras gajni ĉiujn homojn, kiuj lojale sentas por Aŭstrio..."

Federacia Prezidanto de Aŭstrio Miklas. Protektoro de Int. Esperanto-Muzeo en Wien: „Ĉiuj bonaj aŭstrianoj kun-konstruu en la grava verko de la Konstitucio. Nenio nin disigu, nenio nin malhelpu, esti solidaraj en unueco kaj la firma volo... fini la verkon de mortinta kanceliero Dollfuß."

Schuschnigg: „Kapabla landodefendo estas la plej certa garantianto por la paco kaj trankvilo." „La esenco de la nova ŝtato Aŭstrio estas, ke ne ekzistas en la ŝtato aparta ŝtato de laboristoj aŭ kamparanoj aŭ oficistoj aŭ komercistoj ktp., ĉar nur tiam la vera intereso de Aŭstrio povas esti gardata, kiam vere forta kaj justa ŝtato gardas nin ĉiujn."

Kaj je la fino versoj de fama Anton Wildgans el poemo **„La granda sindonado"**:

„Ĉar ĉiam, se de l'sorto la montriloj
Indikis gravan horon por ĉi-ter',
Jen la popol' de gajaj muzoj filoj,
Edenon gardis kontraŭ la infer'!"

La broŝuro, kies teksto estas en germana lingvo, estis sendita laŭ nia peto en po 3 ekzempleroj al ĉiuj internaciaj kaj landaj E.-organizajoj kaj ni donis klarigojn pri la unuopaj punktoj en E.-cirkulero.

La kajero estas havebla kontraŭ 70 g en ĉiu librovendejo, eksterlande ĉe la aŭstriaj ambasadorejoj kaj konsulejoj.

E.-Verbad-Servo por Aŭstrio, Wien I.

FESTSEMAJNOJ en WIEN
FESTLUDOJ en SALZBURG
BRUCKNERFESTOJ
en OBERÖSTERREICH
FESTLUDOJ ĉe LAGO de WÖRTH

estis grandiozaj sukcesoj, ne nur pro la altkvalito de la prezentitaj aranĝoj, sed ankaŭ pro la multnombra vizitantaro, ĉiujare pli kreskanta.



Nova belega Viena Suraltajŝoseo.

Patriota Fronto kaj Esperanto.

En la libreto, enhavanta la favorajojn, kiujn ĝuas la membroj de la P. F.-helpverko „Nova Vivo", sur paĝo 110 en la rubriko „Gvidadoj tra laborejoj de scienco, arto kaj tekniko" la informo „Libera uzado de legejo en Internacia Esperanto-Muzeo kaj ĉe partopreno en E.-kursoj ĉe Aŭstria E.-Asocio 25% rabato en la 4-monataj kursoj po 2 horoj semajne. Aranĝis la aferon kort. kons. Steiner.

Elektra funkciigo de la fervojo Salzburg-Linz.

Oni ne povas imagi, kia grandioza laboro prezentas tia elektrigo de fervojo.

Jen kelkaj ciferoj: por la citita linio la kostoj estos 55 milionoj da ŝilingoj, krome por la alikonstruado de la stacidomoj en Linz kaj Wels 14 milionoj; distanco 125 km; bezonataj por la kondukaj instalajoj 900 tunoj da kupro kaj 5400 kondukmastoj; 6000 laboristoj havos dum 3 jaroj laboron; 28 novaj elektraj lokomotivoj, el kiuj kelkaj atingas rapidecon de 130 km po horo; 50.000 izoliloj.

Oni faras en Aŭstrio ĉion, por agrabligi al niaj gastoj la vojaĝon!

La plej granda **kolekto de moneroj** en privata posedo troviĝas en Wien. Ĝi ampleksas pli ol 200.000 pecojn.

Internacia Esperanto-Muzeo.

Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.

Kotizo: unufoja 17 sv. fr.

Novaj membroj:

D-ro J. G. van **Zandt**, prez. de Esp.-klubo, Los Angeles, Californio.

Donacis S 1.95 Murray Robert, Thorpe Bay.

Donace sendis materialon: Badja, Leningrad; St. Misak, Adana, Turk.; Centra E.-Librejo, Haag; Iberia E.-Servo, Barcelona; Port of Seattle, USA.; Osaka E.-Instituto, Osaka, Jap.; „Frateco", Sevlievo, Bulg.; F. G. Cesarini, Potenza, Ital.; P. Flageul, Issy, Franc.; Literatura Mondo, Budapest; Government Railways, Tokio; Intern. de Militkontraŭuloj, Enfield; Nippon Guide, Tokio; Bulteno „Sunia sulko", Beograd; Esp.-Publishing Co., Rickmansworth; J. Roze, Riga, Latvujo.

Tutmonda Adresaro!

Aperdato: 15. decembro 1937.

Lasta anonctempo: 31. oktobro 1937.

Kotizo nuntempa: 1 svis. fr. aŭ angl. ŝil. aŭ 2½ int. poŝtresp. kup., por kiu sumeto vi estos enpresita en ADRESARO kaj ricevos ADRESARON senpage.

Aldona anonco (koresp., interŝanĝo ktp.) ĝis 8 vortoj kostas la saman sumeton.

La sumetoj devas alveni „nete", do vi devas pagi, se vi sendos per poŝtenpagilo, aŭstr. ŝil. 1.40 aŭ por enskribo aŭ por anonco.

Enpago ankaŭ ebla al konto „Aŭstria Esperantisto, Korneuburg" ĉe aŭstria poŝtŝparkaso en Wien D 123.826.

Grupoj estos enpresitaj senpage, sed **nur** ricevos la ADRESARON, se ili ĝin **pagis** aŭ anoncis **almenaŭ 10 grupanojn** por ADRESARO.

Almenaŭ **100 paĝa ADRESARO** en la grando de la duona gazeto Aŭstria Esperantisto antaŭvidita. La plej bona propagandilo, la plej bona helpilo por komercistoj, kolektantoj, vojaĝantoj!

El multaj landoj jam venis sinanoncoj ankaŭ de **kompletaj grupoj!**

Jenaj punktoj necesas: Nomo (familia kaj antaŭnomo), profesio, preciza adreso, event. organizon (IEL, UEA, SAT, SEU, IKUE ktp)

Post la 15. de novembro la Adresaro sola kostos 2½ sv. fr. aŭ angl. ŝ.

Intern. Esperanto-Muzeo, Wien, I., Neue Burg.

Esperantista Somer-restadejo en Aŭstrio.

Iom post iom konatiĝas, ke en bela Aŭstrio, ĉe unu el la plej belaj lagoj, la tutmondaj esperantistoj estas atendataj!

Ili tie trovos refreŝiĝon en bela regiono kaj helpata de samideanoj Holzleithner kaj Lang.

Interesuloj sin anoncu ĉe Hotelo „Goldenes Schiff" en Gmunden, Oberösterreich. Cambro, 3 kompletaj manĝoj, sen pago de kotizo por la bangastoj entute aŭ. ŝ 8.20 potage.

Vi ĝuas ankaŭ 50% rabaton sur la ŝipoj de Traun-lago kaj sur la kablofervojo.

Informojn vi ankaŭ ricevos de ni kontraŭ respondkupono.

Esp.-Varbadservo por Aŭstrio. Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.

78 Japanaj Parlamentanoj por Esperanto.

Okaze de enketo al 143 parlamentanoj en Japanujo 78 respondis favore al Esperanto, inter ili iamaj ministroj kaj unu iama ĉefministro.

(Laŭ Argentina Esp-isto.)

Artikolo pri „E. Zscheile, la mondvojaĝanto rakontas" en **venonta** numero.

Aŭstriano rondvojaĝas la mondon.

INTERNACIA ESPERANTO - MUZEO kaj **ESPERANTO - VARBADSERVO por AUSTRIO** aranĝas la tutan vojaĝon kaj preparas ĝin.

AUSTRIA REGISTARO helpos al la tuta aranĝo per tio, ke ĝi informas la aŭstriajn diplomatajn reprezentantojn en la koncernaj landoj, helpi al la klopodoj de Schneider kaj al la koncernaj aranĝoj, faritaj de la E.-grupoj kaj unuopaj personoj. Samtempe la REGISTARO disponigas belegajn filmojn pri Aŭstrio kaj la film-aparaton.

Direktoro **ALOIS SCHNEIDER,** membro de Aŭstria E.-Asocio, aŭtoro de „Barbro kaj Eriko", faros ĉi tiun vojaĝon per trajno kaj biciklo eble ankaŭ per motorciklo.

La vojaĝo daŭros proksimume **DU JAROJN** kaj konsistas el 4 partoj:

1. **PARTO:** 6-monata vojaĝo kun prelegoj ktp. tra Ĉeĥslovakio, Hungarujo, Jugoslavujo, Grekujo, Egiptujo, Palestino, Irako, Irano, Hindujo, Hindo-Ĥinujo, Siamo, Hongkong, Ĥinujo al JAPANUJO.

2. **PARTO:** 3—6 monata restado en Japanujo pro stud- kaj kolektceloj kaj prelegoj ktp.

3. **PARTO:** Veturado al kaj tra Ameriko kun prelegoj.

4. **PARTO:** Rondvojaĝo tra ĉiuj eŭropaj landoj kun filmprelegoj.

AUSTRIA ESPERANTISTO ricevos **sola** la raportojn kaj publikigos ilin regule. Aŭstria Esperantisto disponigos la raportojn al Heroldo de Esperanto kaj Internacia Esperanto kaj povas ilin ankaŭ liveri al aliaj gazetoj.

Samideano **SCHNEIDER** estas jam sufiĉe konata en la esperantistaro pro siaj diversaj vojaĝoj. Schneider antaŭ 16 jaroj travivis tutan jaron en Sudameriko kaj dum la ferioj en la lastaj 15 jaroj li trabiciklis kaj tramotorciklis ĉiujn ŝtatojn eŭropajn kaj Nordafrikon. Ĉijare li faris tian vojaĝon kelkmonatan tra Danujo, montrinte filmojn pri Aŭstrio, prelegante en grupoj, lernejoj kaj publike ktp.

La **CELO** de la vojaĝo: a) varbado por Esperanto, b) varbado por Aŭstrio, c) studado de la institucioj en la diversaj landoj sur sociala, etnografia kaj pedagogiaj kampoj, montrante ankaŭ la valoron de Esp. por sciencaj celoj.

La **EFEKTIVIGO** de la celo: a) paroladoj el la Radio-stacioj pri Aŭstrio en Esp. kun sekventa traduko nacilingven flanke de tiea samideano(ino) en formo de intervjuo, tiel montrante, ke la vojaĝo nur estis ebla per helpo de Esperanto, paroladoj en E. kun traduko pri la disvastigo, utileblecoj kaj neceseco de Esperanto, en publikaj rondoj kaj lernejoj, kaj per tio helpo en la starigo de novaj kursoj; b) klarigo de belaj filmoj pri Aŭstrio en Esperanto aŭ germana, angla aŭ franca lingvoj, laŭ neceseco, en lernejoj, grupoj kaj en publikaj rondoj; c) studado de diversaj institucioj por posta verkado de koncerna raporto al la Aŭstriaj Ministerioj kaj tiamaniere montri la necesecon de Esperanto; d) kolektado por la ŝtataj muzeoj.

Schneider ne nur montros Aŭstrion en filmo, nome: a) vojaĝo tra Aŭstrio de okcidento al oriento kaj, b) de oriento sur alia vojo al okcidento, c) aŭstriaj inventistoj, d) aŭtoveturado sur la plej alta montŝoseo en Eŭropo trans Großglockner, e) kutimoj kaj kostumoj en Aŭstrio, li ankaŭ disdonos belegajn **gvidlibrojn** (42 paĝajn), bele ilustritajn, pri Aŭstrio kaj donos **informojn** por **komercistoj** pri komercaj interrilateblecoj; por **malsanuloj** pri kuraceblecoj en la famaj aŭstriaj kuraclokoj; por **studemuloj** pri **studeblecoj** en niaj famaj Universitatoj, Teknikaj Altlernejoj, Konsulakademio ktp.; por **sportuloj** pri montgrimpado, ski-, rodlo-, kajak-, boat-, ĉevalkurado-, velŝip-, naĝ-, polo-, tenis-, golfo- ktp. sportoj kaj por **vojaĝantoj** pri restadeblecoj ktp. Krome li raportos pri **Festludoj en Salzburg, Viena Foiro, Vienaj Festsemajnoj, Bruckner-festaranĝoj** kaj **Festludoj ĉe Lago de Wörth,** Li raportos ankaŭ pri **Internacia Esperanto-Muzeo** kaj ties riĉaj valoraĵoj!

Dum la dua, tria kaj kvara partoj Schneider ankaŭ montros filmojn pri sia ĝisnuna vojaĝo. Pri tio sekvos informo pli poste, kiam li povos komenci ĉi tiujn partojn de sia vojaĝo.

La vojaĝo **komenciĝos la 3. de novembro 1937.** Jen la **Programo** en grandaj trajtoj: **Bratislava** (3. nov.), **Komarom** (4.), **Budapest** (5. kaj 6. nov.), **kroma Hungarujo** (7.—15. nov.), **Jugoslavujo** (16.—30. nov.), **Grekujo** (1.—8. dec.), **Egiptujo** (12.—20. dec.), **Palestino** (21.—31. dec.), **Irako** (2.—9. jan. 1938), **Irano** (10.—25. jan.), **Hindujo** (februaro), **Siamo, Hindo-Ĥinujo** (marto), **Ĉinujo** (aprilo), **Japanujo** (majo ĝis eventuale fino de oktobro) ktp.

Por ebligi al ni la efektivigon de la vojaĝo de samideano Schneider, necesas, ke la **grupoj** kaj, kie ne estas grupoj aŭ kie la grupoj ne bone funkcias, **fervoraj samideanoj** helpu al la entrepreno.

Ili **klopodu aranĝi prelegojn** en la **grupo, antaŭ ne-esperantista publiko,** en **lernejoj** kaj **unuavice en Radio-stacio.** Vi **elektu,** ĉu la paroladoj okazu en Esperanto aŭ en germana, angla aŭ franca lingvoj, kiujn el la 4 filmoj vi deziras (ĉiu daŭras proksimume 40 minutojn) kaj informu nin, ĉu vi deziras sub la aldonitaj kondiĉoj **aranĝi parolado(j)n** kaj **kiom** kaj **kie.**

La **rekompenco** por la laboro de s-ano Schneider estas vere **tre modesta: 10 svis. fr.** aŭ la **egalvaloron** por la **parolado en la grupo aŭ antaŭ la publiko** kaj **krome modesta gastigado; malgrandaj, malfortaj** grupoj pagos **iomete malpli,** laŭ interkonsento; sed ni **esperas,** ke pli grandaj, fortaj grupoj libervole iomete altigos ĉi tiun vere malaltan rekompencon, de kiu Schneider **devas pagi la veturadon** sur fervojo kaj la **restadon,** se li ne faras prelegon kaj ne estas gasto ĉe samideano. — En tiuj lokoj, kie Schneider havas **pagatan prelegon,** li **prelegos ankaŭ en lernejo senpage** kaj la grupo povos uzi la eventuale tie pagitan monon- por rekompenci lin. — La Radio-rekompencoj restos al Schneider kaj ili **helpu malgrandigi** liajn vojaĝkotsojn.

En la **ĈEFURBO** la grupoj kaj s-anoj klopodu ricevi senpagan veturbileton fervojan por la koncerna lando (despli, ĉar Schneider skribos artikolojn pri sia vojaĝo ankaŭ por la grandaj tagĵurnaloj en Wien kaj fakĵurnaloj). Vi ankaŭ vizitu la aŭstrian ambasadorejon kaj konsulejon por peti helpon kaj priparoli, kiujn rondojn oni invitu al la paroladoj de Schneider.

En **ĈIUJ LOKOJ** (do en la ĉefurboj kaj alie) oni invitu la tie ekzistantajn **grupojn de aŭstrianoj kaj germanoj,** komune kun vi aranĝi paroladon aŭ eventuale apartan nur en **germana lingvo.** Kie ne ekzistas tiaj grupoj, invitu la unuopajn aŭstrianojn kaj germanojn, por ke ili invitu siajn konatojn. Vi per tio helpas al la vojaĝo de Schneider kaj faras samtempe propagandon por Esperanto en via loko inter tiuj rondoj, kiuj verŝajne ĝis nun estis **kontraŭ** Esperanto.

La **E.-grupoj kaj fervoraj samideanoj** en Hungarujo, Jugoslavujo, Grekujo, Egiptujo, Palestino, **respondu** al ni **ĝis fino de septembro 1937** jenajn demandojn, por ke ni povu aranĝi la vojaĝon por novembro kaj decembro. La menciitaj restadtempoj ne jam estas precize fiksitaj sed proksimumaj kaj **direktiĝos** laŭ la **alvenintaj konsentleteroj. Do respondu kiel eble plej rapide, vi helpos per tio al la afero kaj agos en via propra intereso.**

Demandaro:

1. Ĉu vi deziras prelegojn de Schneider? **Kiom kaj je kiom da tagoj** sinsekvaj?
2. Ĉu parolado en **Radio** estos ebla?
3. Kiom vi deziras pagi? (Pli aŭ malpli ol 10 sv. fr.?)
4. Ĉu vi deziras, ke Schneider **ankaŭ** prelegu en via **ĉirkaŭaĵo?** Kie? Kiamaniere atingebla?
5. En **kiu lingvo** li parolu?
6. Ĉu vi estas preta, **gastigi** s-ron Schneider dum 2—3 tagoj, dum kiuj li ne prelegas.
7. Se tio ne eblas, **kiom** kostas **po tago** la restado en via loko, se Schneider deziras ripozi kaj verki por la eldonotaj libroj?

Atendante tre baldaŭ, sed ne pli malfrue ol ĝis fino de septembro vian ŝatatan respondon, ni kore salutas vin.

Intern. Esp.-Muzeo k. Esp.-Varbadservo p. Aŭstrio: Steiner.
Wien I, Neue Burg, Aŭstrio.

Sed Schneider donos al vi ankaŭ la eblecon aĉeti interesajn librojn:

„XII. Somera Universitato, Konferenco de Instruistoj, Konferenco de Virinoj" 64-paĝa, 23.5 je 15.5 cm, kun 18 prelegoj el 11 landoj; bona preso, bela eksteraĵo, tre bone recenzita. Tre grava helpilo kaj propagandilo, por montri al superaj instancoj la gravecon de Esperanto. **Aŭ ŝ 3.—.**

„Albumo de Wien" kun 106 bildoj kaj klarigoj en E. ankaŭ laŭ historia vidpunkto, 16.5 je 24.5 cm. Belegaj fotografaĵoj, memoraĵo al vizito de Wien. **Aŭ ŝ 3.—.**

„Per aŭtobuso tra Aŭstrio kaj Wien", 80-paĝa tre detala gvidlibro tra Aŭstrio kun pli ol 70 belaj bildoj en ĉiuj partoj de Aŭstrio. Tre ŝatata! **Aŭ ŝ 1.80.**

„Antaŭaj Cirkonstancoj", burleskaĵo de la fama aŭstria verkisto Johann Nestroy. 40-paga, malgrandformata. Instigas al ridado, kaj ridado sanigas! **Aŭ ŝ —.60.**

„Freude durch Esperanto", (Ĝojo per Esperanto), germanlingva lernolibro de Hugo Steiner, fondinto kaj direktoro de IEMW, 96-gaĝa. Bonegaj recenzoj. **Aŭ. ŝ 2.40.**

15% rabaton, se vi mendos **pere de Schneider.**

El miaj vojaĝfolioj.

(Dir. Alois Schneider.)

Al miaj danaj amikoj!

Antaŭ mi la hejmaj montaroj, arbaroj, la hejma rivero, la vilago, la malnova kastelo. Ĉu realeco? Mia koro ankoraŭ vagas, vagas, supre en la nordo.

Vasten etendiĝas la lando: farmoj ombrumitaj de arboj; verdaj herbejoj kun ruĝaj bovinoj; nigraj ventmuelejoj, larĝturaj preĝejoj, ĉarmaj urbetoj, lagoj, arbaroj proksime.

Mi foliumas en libro — mi estas ĉe vi — rakontas pri miaj migradoj, varbas pro nia bela ideo kaj sentas denove la feliĉon, kiun gajaj lecionoj, ridantaj infanokuloj ĉiam donis al mi.

Multaj de vi petis sciigon pri mia estonta laboro; sed neeble estas, persone skribi al ĉiu. Estu tiuj leteroj, kiujn mi en la gazeto al ĉiuj direktas, inter ni ĉiama ligilo.

Post multaj feriaj migradoj en la signo de la verdstelo Danlando estis la unua stacio de mia vojaĝo, kiu min ĉiulanden alportu, por ke mi varbu ĉie por nia afero.

Antaŭ ses monatoj, kiam mi pro mia frua pensioniĝo vidis subite la eblon, efektivigi la planon, dum jaroj nutritan, estis komence timo en mi. Mi estis preta, fari ĉion, por atingi la celon, sed mi demandis min, ĉu mi havos la fortoŭ, venki ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj amasiĝis antaŭ mi; ĉu mi en la fremda lando trovos komprenon, kunlaboron kaj helpon. Vi donis novan kuraĝon al mi, novan forton — mi dankas korege.

Sincere! Dum la unuaj semajnoj mi nepre ne estis kontenta. Kelkaj rigardis min tiel serioze, malfide; kelkaj faris en la gastigado tro multe: mi devis manĝi montojn da butero, da fromaĝo kaj dolĉa bakajo; oni donis al mi ĉiutage 5- aŭ 6-foje kafon fortegan, kiun mi ŝatis tiel multe, ke mi kŭn plezuro permesis, plenigi ĉiam dufoje la tason, ĝis, ĝis ...

— Ĉu vi rememoras mian ĝemadon: „Min Mave! Min Mave!“ Aŭ mian malesperan: „Jeg kan ikke mer.“

Sed kelkajn el vi mi enfermis la unuan tagon en mian koron. Tiuj belaj tagoj en Lunderskov, en Gelballe, en Gesten!

Al vi, amiko Dörfler, mi dankas antaŭ ĉio tiun feliĉon. Vi kondukis min en la domon de la nigra kamenpurigisto — en la domon gasteman, kie mi travivis tiom da horoj belegaj. Amiko kamenpurigisto, Thykjaer-Flyndersae mi dankas — kvankam ni ofte disputis pri la interna ideo, kvankam vi ĉiam nur akcentis la praktikan valoron de E. Preskaŭ vi rajtis: ĉar multaj, el kies vortoj idealismo ŝajnas gutegi, nenion valoras kaj faras malbonon. Sed vi tamen estas idealisto, vera idealisto, ĉar vi volas utilon por ĉiuj. Vi estas idealisto senscie, ĵus tial, ĉar vi tion ne scias. Mi salutas vin kaj vian kuraĝan edzinon, kiu — malgraŭ malsano malebligis partoprenon en kurso — en ses semajnoj iĝis bona esperantistino.

Sinjorino Roldsgaard ankaŭ al via klopodo mi dankas, ke mi povis venki la malfacilaĵojn de la komenco. Krom viaj okupoj kiel mastrino en granda bieno, krom via kokinfarmo kaj tiurilataj vojaĝoj kaj kursoj vi trovis ĉiam tempon ankoraŭ, okupi vin pri E., aranĝi paroladojn kaj festojn, subteni la fremdulon en lia laboro.

Einar Langkilde! De vi mi esperas multe en la estonteco de nia afero. De frumatene ĝis malfruvespere vi laboris diligente en la farmo de via avo, sed la horoj de la nokto donis tempon la vi, formi vian intelekton, okupi vin pri demandoj sociologaj kaj el tiu kaŭzo ankaŭ pri E. 24jara, vi jam majstras la lingvon, bona instruisto vi estas.

Mi pensas al vi, karaj lernantoj! Daŭrigu la konstruon, kiun vi komencis! Einar povas kaj volas vin helpi.

Mi dankas al la verda sinjorino de Bejerringbro pro ŝia klopodo, mi dankas al Wekerle, la hungara verkisto, pro la spritaj konversacioj, kiujn li ebligis al mi. Mi nur bedaŭras, ke ni ne trovis tempon, prepari kaj manĝi la gulaŝon, kun multe da papriko, tute laŭ hungara maniero. Mi dankas al patrineto Ornström, kiu tiel bone zorgis por mi.

Mi dankas al ĉiuj, en Aarhus, en Lillering kaj en Oedder.

Mit pensas al Gyllingskov — al la ĉarma lernejo enmeze de arbaro, kie interesa esperanta rondo formiĝis: la instruisto Skojberg, la instruistino, la kuracisto, ties 18jara filino, la edzino de la komercisto. Jam mi komencis dubi pri mia entrepreno, jam mi komencis pensi pri reveturado — mi trovis ĉe vi varman komprenon, kuraĝigon, esperon. Doktoro Didriksen, vi montras, ke E. ne nur estas la latino de la popolo, sed ankaŭ afero de personoj altedukitaj. Mi pensas al la horoj, dum kiuj vi kondukis min en via aŭtomobilo, parolante kun mi pri viaj studoj kaj esploroj geologiaj, pri la prahistorio de via lando — en E. Kial ne en latino? Vi studis ĝin dum 8 jaroj, mi ankaŭ dum 4! Amikoj en Gyllingskov, mi esperas, ke ni nin revidos. Eble ankoraŭ antaŭ mia azia vojaĝo, por komuna laboro!

Kion vi faras, amikoj en Vejle? Ĉu ni revidos nin, Hagen, kara amiko? Ĉu mi iam sciiĝos, kiel vi, via edzino kaj fraŭlino Needergaard fartis dum la sveda vojaĝo?

Rugsted, en farmo soleca. Neforgeseblaj estas la horoj al mi. La farmisto estas esperantisto, la farmistino, la servisto, la servistino, kaj ankaŭ la laktisto, kiu regule la farmon vizitas. Feliĉa patrino prezentas al mi unujaran knabinon kiel estonta esperantistino. Mi salutas vin, amikoj en Rugsted.

Mi devus skribi libron, se mi volus paroli pri ĉiuj, kiuj subtenis min en miaj klopodoj.

Amiko Skole in Silkeborg, amiko Grönborg en Risskov, kiel mi bedaŭras, ke mi ne povis viziti viajn kursojn en tiu somero. En vi mi konatiĝis kun homoj, kiujn idealismo ligas kun forta energio — malofte, sed senfine grava en nia movado.

Amiko Heilskov, mi aŭdis pri viaj belaj poemoj, mi esperas, ke ni nin revidos.

Langaa. Du tagoj en printempo. Poste adiaŭo. Amiko Nielsen diras: „La ĉambro en la unua etaĝo vin ĉiam atendas.“ Infanoj salutante svingas la manojn. La fiŝvendisto kuras al mi, la germana seruristo: „Farvel! Venu denove.“

Sinjoro Bagge el Randers, mi dankas al vi. Ankaŭ al vi, amikoj el Viborg, el Fredericia, el Vejen, el Vordingborg, el Stubbeköbing, el Taagense.

Amiko Nielsen el Korsör — miaj Nielsen-amikojn mi nur povas diferenci laŭ urboj — mi pensas al vi, al via kara edzino kaj al la malgranda Lies. Ĉu ŝi ankoraŭ iom scias pri la fremdulo, kiu „ser saa maerkelig ud“ aspektus tiel strange.

Estis bele. Estis bele ankaŭ en la infanĝardeno de fraŭlino Cristiansen. La uletoj grimpis sur la fremdulon, volvis siajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon. Ankaŭ la infanoj helpis min per sia malgranda amo.

Karaj amikoj, mi pensas al vi. Vi aŭskultis interese miajn vortojn; mi venis de loko al loko — mi nun jam multe povus rakonti pri mia migrado en via lando.

Pli ol 3500 km mi veturis en Danlando dum la 3 monatoj. Mi kunestis kun Jutlandanoj, „la maljunaj homoj seriozaj“, kun Selandanoj „kun junaj kaj gajaj“, kun Fuenoj, „la ege infanaj“. Kompreneble ankaŭ kun Lolandanoj, mi ne scias ilian „ŝercnomon“. Mi veturis tra la dana printempo, mi apogis min al la masto en la ŝipo, rigardante la bluan maron, facile ondantan; mi trinkis ĉiam kaj ĉiam novan belecon, mi lernis ami Danlandon.

Mi partoprenis en viaj festoj, mi ne laciĝis, rigardi viajn popoldancojn.

Mi estis en viaj junularkunvenoj, per parolandoj en ili estis eble al mi, starigi du novajn kursojn.

Mi parolis en 22 klubkunvenoj, mi vizitis 36 lernejojn: popol-, real-, altlernejojn, gimnaziojn, propagante ĉie por E. Generale la samideanoj en Danlando estas koncerne la instruistaron sufiĉe skeptikaj. „La instruistoj ne subtenas nin, ili eĉ kontraŭlaboras“. Tamen mi esperas multon de la propagando en la lernejoj. Mi estas akceptita afable ĝe en ĉiuj lernejoj. Ofte la propagando estas plej efika, se oni nur igas paroli la faktojn. Tiamaniere mi povis — sen mia intenco — montri en iu lernejo, kiun misuzon oni faris en la instruo de naciaj lingvoj — ankaŭ en la progresema Danlando.

Esperantistino prezentas min al la direktoro. Li montras al mi la lernejon; mi diras, ke mi senpage volas fari lumbildparoladon, germane, france aŭ esperante. Li plezure akceptas, li deziras paroladon germanan. Mi komencas; sed la du german-instruistoj ne kapablas, traduki miajn sufiĉe simplajn frazojn. Do Esperanto. La esperantistino, kiu dum kelkaj monatoj ellernis la lingvon, tradukas, tradukas flue.

Lernejinspektoro estas entuziasma anglisto. „Senĉerpebla fonto, miljaraj kutimoj kaj moroj!“

Mi respondas: „Ankaŭ mi ŝatas naciajn lingvojn. Ankaŭ mi ŝatas torentojn, kiuj en miljara laboro faris mem siajn fluejojn; sed mi ankaŭ ŝatas kanalojn, kiuj trafluas kulturlandon. Mi ŝatas la enigman, misteran de la naciaj lingvoj — sed mi ankaŭ staras respektplene antaŭ la mirakla kreaĵo de homa intelekto, la kreaĵo de Zamenhof.

Ni longe diskutis, kaj mi esperas, ke la entuziasma anglisto iam estos ankaŭ entuziasma esperantisto.

Plej facile oni povas konviki instruistojn, por kiuj la studado, kaj instruado de lingvoj estas korafero; ili komprenas plej facile, kion E. signifas, se ili nur iomete pli detale rigardas ĝin. La gimnazidirektoro, kiu mem parolas multajn lingvojn kaj en kies lernejo la lernantoj plej bone parolas la germanan kaj latinan lingvojn kaj kun kiu mi dum kelkaj horoj diskutis pri lingvaj problemoj, juĝis ankaŭ tute ĝuste pri E.

Ni devus venki ankoraŭ mil, mil antaŭjuĝojn. Tiuj plej ofte estas ĉe intelektuloj. Sed ĝenerale la intelektuloj en Danlando estas sufiĉe malpedantaj kaj modestaj, por akcepti informojn en aferoj, kiuj estas fremdaj al ili.

Mi volus ankoraŭ multe diri. Mi volus multe paroli pri metodaj problemoj. Sed tio estas tute aparta temo, en tiu letero ne estas plu spaco. Eble alian fojon.

Eble mi vidos vin ankoraŭ dum kelkaj semajnoj en aŭtuno. Mia restadpermeso estas plilongigita. Eble mi povos labori kun vi ankoraŭ kelkajn semajnojn.

Mi ne scias. Mi volas komenci mian Aziovojaĝon, se ĉiuj kondiĉoj estas plenumitaj — la mondo estas granda, ĉie mi volas varbi.

Sed kie ajn mi venos — tiu bildo estos, ĉiam en mia animo: farmoj, ombrumitaj de arboj, verdaj herbejoj kun ruĝaj bovinoj, nigraj, ventmuelejoj; larĝturaj preĝejoj; ĉarmaj urbetoj, lagoj, arbaroj proksime — kaj multaj afablaj homoj.

Mi salutas vin. Mi petis la saman, kion mi petis miajn lernantojn kaj amikojn dum la finfesto en Gelballe: „Memoru kelkfoje la solecan migrulon, memoru kun afabla deziro!“ Mi kredas, ke en bondeziroj estas forto mistera. Ankaŭ viaj vojoj estu benitaj!

En oktobro 1937 aperos la UNUA VOLUMO de „MODERNA AŬSTRIA ANTOLOGIO el la 20. jarcento“, almenaŭ 64-paĝa, 23.5 je 13.5 cm, sur bela papero kun gustumprovoj el verkoj de tiaj famaj verkistoj. Ni nur citas kelkajn: Mell, Wildgans, Henz, Schreyvogel, Liszt, Zernatto, Grogger, Visér, Suso-Waldek, Schnitzler ktp. La **prezo de ĉiu volumo** (aperos 6 kaj ĉiu estas tute kompleta kaj finita) estos **kun afranko aŭ. s 2.40.** Kiu mendos la **tutan serion,** ricevos senpage belan kovrilon por la tuto.

EL LA MONDO

Vivo de Zamenhof en teatro.

Teatro Ŝin-Cukiĝi, kiu estas tre fama pro kuraĝa entrepreno de novaj teatraj agoj, nun intencas prezenti sur scenejo la vivon de Zamenhof.

En nuna momento, japana juna generacio soife atendas kuraĝigan arton. Teatro Ŝin-Cukiĝi sukcesis en lasta jaro, prezentinte dramon de Gorkij „Mizera Fundo“. En tiu ĉi januaro ĝi prezentis „Gajaj edzinoj de Windsor“ de Shakespeare kaj la sukceso estis brila. En la nova repertuaro por tiu ĉi jaro ĝi volas havi vivojn de herooj de homara kulturo, ekz. Darwin, Pasteur, Hidejo Noguci ktp. Konsiderante la jubileon de Esp. kaj humanisman aspiron de la publiko, la teatro sentas devon dramigi kaj prezenti sur scenejo la vivon de Zamenhof. En tiu ĉi teatra trupo sin trovas fervora kaj malnova samideano Takamaru Sasaki. Li estas fama aktoro kaj samtempe drama verkisto.

Anoj de Sciencista Pluma Klubo subtenas ĉi tiun planon de la teatro kaj promesas fervore helpi ĝin.

Mussolini-anekdoto.

(Laŭ Manchester Guardian.)

Antaŭ 2 semajnoj kelkaj senatanoj promenadis babilante en la promenejo, kiam subite Mussolini „ne anoncite“ venis. „Pri kio vi parolis?“ li demandis suspekte. „Ekscelenca moŝto“, respondis unu el la senatanoj, „ni ĵus parolis pri tio, ĉu vi ne tro malbone traktas Eden kaj Chamberlain.“ „Ha“, ridetis Mussolini, „ĉi tiuj homoj nenion valoras; se mi havus ilin ĉi tie, mi igus ilin senatoroj.“

Elisabeth Rethberg, la fama kantistino, rakontas:

Unu el la plej belaj ĉapitroj de mia vivo estas la konkirado de „Kapitol“; mi pensas pri la „Blanka Domo“ en Washington. La prezidanto de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko Coolidge estis invitinta min kaj mi la unuan fojon post la mondmilito kantis tie germanajn kantojn. Kiam mi finiĝis, la prezidanto aliris kaj diris: „Sinjorina moŝto, kio ne sukcesis al ĉiuj germanaj diplomatoj, al vi sukcesis — vi konkiris Kapitol kaj niajn korojn!“

En Metropolitan mia sukceso estis Aida, al kiu mi dankas la Ormedalon por belkanto de Columbia-Universitato en New York. Sed mi ne deziras forgesi, ke mi kantis en Dresden ĉe la unua prezentado „Egiptan Helene“ sub direktado de Fritz Busch.

Mi kantis en Aŭstralio antaŭ altekultivita publiko, en la regnoj de Maharaĝoj, en Kalkutta kaj Bombaj.

Mi multon vidis de la mondo, sed mi ĝojas veni al Aŭstrio, al Wien kaj Salzburg.

Propaganda propono, farita de la Espero:

Ĉiu esperantisto sendu Esp.-ŝlosilon al ne-esperantisto!

La ŝlosilo estas tre bona propagandilo kaj, ĉar la prezo estas tre malalta (10 pecoj en Aŭstrio ekz. nur 1 ŝ), ĉiu povas sendi al instruistoj, ĵurnalistoj, inĝenieroj kaj al aliaj interesuloj tian ŝlosilon.

Ĉiu sendu en septembro ŝlosilojn por prepari kursojn! Germanaj haveblaj pere de Int. E.-Muzeo, Wien, I., Neue Burg (10 kun afranko 1 angla aŭ aŭstria ŝ aŭ 1 sv. fr.).

Nova eldono de la oficialaj leter-kovertoj en **USSR** kun enpresita poŝtmarko. Sur la kovertoj la tekstoj estas en 3 lingvoj: rusa, franca, Esperanto.

„Nederlanda Polica Esperanto-Unuiĝo“ Rotterdam, Luzacstr. 21 a, estas fondita komence de 1937, celanta disvastigi E.-on inter policistoj. Kiel ligilon ĝi eldonas „Monata Polica Bulteno“, sama adreso. Ankaŭ eksterlandaj policistoj povas aliĝi.

Direktoro **Schneider** en Maroko per motorciklo.

Granda sukceso en Danlando.

La kursoj en Fuglsö, aranĝitaj de s-roj Grönborg kaj Weide, bone sukcesis. Venis 180 pers. el 11 landoj. Kiel gastoj s-anoj Minor kaj d-ro Szilagyi. La festo unuigis 300 esp-istojn kaj oni nomis ĝin „Universala Kongreso de la malriĉuloj“. La elspezoj estis ja tiom malaltaj. Venontjare ne preterlasu partopreni en unu aŭ alia kursserio. (Orig. raporto.) Ges-oj Grönborg vizitis antaŭ kelkaj semajnoj la E.-Muzeon en Wien.

Mondkongreso de Bontemplanoj.

Orig. raporto de H. Salokannel, Uusikaupunki, Finnlando.

La mondkongreso de la bontemplanoj (IOGT.) okazos en Helsinki en 1939. Esperanto jam estas aprobita kiel kongreslingvo apud la franca, germana kaj angla lingvoj. Tuta festo estos okazigata de la frujunulara cirklo de Malmi en Esp., gvidota de instruisto J. N. Mikkola. Ĝi estos bonega propagando por nia lingvo inter la geanoj de tiu ĉi plej fama abstinenca organizaĵo en la mondo.

Internacia Rotario.

La nova prezidanto de Internacia Rotario, la franco Maurice Duperrey el Paris, elektita dum Internacia Rotaria-Kongreso en Nice (Francujo) en junio, estas fervora esperantisto. Parton de sia unua parolado dum la kongreso li faris en Esperanto.

Esperanto-Domo en Arnhem.

La direkcio de la nederlanda poŝto farigis specialan poŝtstampilon, per kiu estas stampataj ĉiuj poŝtaĵoj, kiujn oni ekspedas per la propra poŝt-kesto de la Esperanto-Domo. La stampilo montras la daton de la ekspedo kun la vortoj „Esperanto-Domo, Arnhem“ kaj kun la kvinpinta stelo.

Al Mondekspozicio en Paris

veturu tra Aŭstrio, ĉar vi ricevos en la tria klaso 25%, en la dua 33⅓% rabaton por la linio de iu limo al Salzburg. Por la plua veturado de Salzburg al Buchs (svisa limo) kaj krome de Buchs al Basel (tra Svislando) vi ricevos 60% rabaton.

Kondiĉoj: Montro de la enirkarto al la ekspozicio en Paris, samtempa aĉeto de la fervojbileto tien kaj reen kaj restado en Paris de almenaŭ 5 tagoj! Uzu la okazon! **Oesterr. Verkehrsbüro,** Wien, I., Friedrichstraße, donas la informojn.

Jugoslavaj laboristaj esperantistoj.

VI. Konferenco okazos la 6. sept. en la salono de Laborista Ĉambro.

FOIROJ

Specimena Foiro en Wien, (5.—12. sept. 1937) eldonis belaspektan E.-varbilon, kiu estas havebla pere de E.-varbadservo por Aŭstrio, Wien, I. Neue Burg aŭ de Viena Foiro, Wien, VI, Messepalast, Aŭstrio.

Budapest-a Foiro enhavis E.-standon, kiun bele kaj lerte aranĝis H. Mihalik, L. Zinner, E. Preis kaj A. Farkas.

Internacia Foiro, Marseille, dum la dua dusemajno de septembro, invitas per Esperanto-propagandiloj kaj belaj E.-glumarkoj al vizito, tre facile farebla por la vizitantoj de Internacia Ekspozicio en Paris.

Foiro de Reichenberg (15.—22. aŭg.) varbis ankaŭ ĉi-jare per belaj E.-afiŝoj (grandaj kaj malgrandaj) kaj glumarkoj. Ĝi havas apartan E.-Fakon jam de multaj jaroj, kiun gvidas s-ano prof. inĝ. Gustav Scholze, prez. de Germana Ligo de Esp. en ČSR.

KOLEKTANTOJ

Por filatelistoj!

Ne estas facile komenci nun la kolektadon de poŝtmarkoj. La plej multaj homoj tial nur kolektas certajn kontinentojn aŭ nur landojn.

La bezonon de tiaj kolektantoj je albumoj por kolekti nur kelkajn landojn, plenumis aŭstria poŝtmarkvendisto kun sia albumo „Letra“. Presita sur bonega senligna forta papero „Letra“ eldoniĝis jam por ĉiuj eŭropaj landoj, kompreneble haveblaj unuope aŭ kune. Ĝi havas krome la avantaĝon, ke ĉe ĉiu fako por poŝtmarko estas menciitaj la numeroj el la katalogoj Senf, Michel kaj Yvert. „Letra“ estas pli kompleta ol ĉiuj ĝis nun eldonitaj poŝtmarkalbumoj, tion persone kun plezuro mi spertis nun kaj pro tio mi rekomendas ĝin al vi.

Mendu informojn de „Letra“, Wien, I., Tuchlauben, aŭ de nia redakcio. Steiner.

Esperanto-glumarkkolektantoj.

Ĉu vi scias, ke ekzistas Rondo de Esp.-glumarkkolektantoj, kiu eldonas apartan interligilon „La Glumark-Kolektanto“, kvaronjare? Skribu al red. **d-ro Jozefo Takács,** Nagymaros, Magyar u. 26, Hungarujo. La katalogo ampleksas jam pli ol 220 glumarkojn.

Novaperaĵoj: Zamenhof en 2 grandoj en div. koloroj, desegnitaj de nia fama Ludovic Rodo en Paris; Jubileaj, 10 div., ĉe **G. della Savia** en Udine, Via della Vale 12, Ital. kaj 10 div. ĉiu sur 10 diverskolera papero de **E. Preisz,** Budapest VII, Szövetség u. 28 b, Hungarujo.

E.-prospekto pri **Viena Foiro** aldonita.

Fotografistoj!

Ekspozmezura karto, verkita de Vilho Setälä. Helsinki, Kluuvikatu 5 A, Finnlando. Bazo: longeo de la ombro de persono, mezurata per paŝoj. Tre bona helpilo, portebla en la veŝtpoŝo.

Kolektantaj esperantistoj aliĝu al Kolektanta Rondo, la klubo de la **E.-kolektantoj**, jara kotizo 10 fr. fr. Prez.: R. Melo, 30 Chemin Vert, Drancy, Franc.

Grava perdo.

La laborema prezidanto de Nederlanda Landa Asocio LEEN, s-ano P. W. Baas, pro malbona sanstato rezignis pri siaj funkcioj.

Kion s-ano Baas signifis por la nederlanda movado, tion lia vicprezidanto Holleman kortuŝe diris en Nederlanda Esperantisto, la organo de LEEN.

Mi konas s-anon Baas kiel komitatanon kaj la estraro kaj la komitato de IEL. unuanime bedaŭras, ke tiu vigla, energia kaj sperta s-ano nun ne plu povas kunlabori kun ili.

Kara amiko Baas, refortiĝu kaj revenu baldaŭ al ni.

Sincere la via Steiner, erstrarano de IEL.

S-ino Borel, la edzino de la direktoro de Radio-stacio Lyon-la-Doua, fervora samideanino kaj plej vigla batalantino en la virina kaj porpaca E.-movado, mortis.

Lastan fojon mi vidis ŝin dum la Virina Konferenco en la III-a en Wien.

Ni neniam forgesos nian samideaninon Borel! Al la edzo koran kunsentadon !

Steeiner.

Ilija F. Puhalo mortis la 21. junio en sia naskiĝloko Koprivnički Bregi post longa malsano 38-jara. Li depost 1922 multe laboris en E., estis vicprez. de Int. Fervojista Ligo kaj red. de ties gazeto „La Fervojisto".

Internacia verda geedziĝo.

F-ino Ine Woudstra (Nederlando) s-ro Dolfa Bartošik (Ĉeĥo). Koran gratulon!

EL LA LEGANTARO

La Prezidanto de
Donaudampfschiffahrtsgesellschaft.

Wien, 22. julio 1937.

Tre estimata s-ro kortega konsilisto!

Ricevinte vian afablan leteron mi dankas kore por la pruvekzemplero de AE. kun via propaganda artikolo. Same mi dankas por via afabla preteco, ankaŭ plue labori por la interesoj de aŭstria fremdulfrekvento kaj DDSG, kio koncerne la grandan disvastiĝon de Esperanto estas tre grava. Kun la esprimo de plej alta respekto. Fey.

„La kontenteco, kiun via belega gazeto AE kaŭzas al mi, devigas min sendi al vi la nunan leteron, petante, ke vi bonvulu akcepti miajn varmajn kaj sincerajn gratulojn, ĉar krom nia ideologio, vi faras servon al via ĉarma kaj bela lando. Tamen mi rimarkis kune kun ĉi-tieaj ges-anoj, ke Radio-Wien bedaŭrinde ne komprenas vian afablan kaj patriotan klopodon, el kiu devenas tiama bona efiko por via patrolando, ĉar alie ne ĉesus la E.-kurso pli frue ol la aliaj lingvo-kursoj...

N. Spaghadhoros, Kavala, Grekujo."

„Via gazeto interesas min ankaŭ pro tio, ĉar ĝi montras, ke ekzistas ankoraŭ vigla, vere neŭtrala E.-movado. Estas bedaŭrinde, ke Esp. estas uzata (pli bone: misuzata) de la plej diversaj politikaj organizacioj kaj per tio la tuta movado estas disigata en malgrandajn, sensignifajn grupojn. Nia movado estus granda, se ne estus tiu disiĝo de la esp-istoj laŭ politikaj kaj aliaj vidpunktoj! Eble estis granda eraro„ ke oni permesis, ke „Esperanto povas esti uzata de ĉiu ajn persono por ĉiu ajn celo!" **Polivka, St. Joachimstal.**

„Jes, plezurege mi aliĝas al ‚Tutmonda Adresaro', kaj varme mi aplaŭdas vian ideon. Certe post malapero de Tutmonda Jarlibro jam la esperantistaro ne havas eblecon serĉi korespondanton laŭ siaj emoj aŭ tendencoj. ...plej simple estas serĉi tiujn bezonatajn adresojn arege sur klasikigita dika libro, kiu cetere bone impresas la publikon kaj helpas por la propagando aŭ por la altaj instancoj. Mi do opinias, ke la ideo estos bone akceptita de ĉiu esperantisto, kaj je mia flanko, mi faros ĉion, kio estas en mia povo por ĝia sukceso... **Giordano B. López,** prez. de Argentina E.-Asocio kaj Peranto de IEL por Argentinio, **Buenos Aires.**"

„Legante en Esperanto Internacia, ke vi travivis 25 jarojn de fruktodona laboro por Esperanto, mi tre deziras gratuli vin je la okazo de la datreveno, pro via grandioza agado kaj penado por nia amata lingvo. Samtempe kiel signon de mia rekonigo de tiu longa kaj fidela laboro sur diversaj Esp.-kampoj, mi petas akcepti la enmetitan serion de neuzitaj ‚kronigaj' poŝtmarkoj el mia patrujo. Gi ĉiam restu antaŭ vi por memorigi vin, ke mi ŝategas vian sindonan, kuraĝigan kaj imitindan laboradon. Vivu longe vi! **Wm. H. King,** Honora Sekretario de Novzelanda E.-Asocio, **Wellington,** Aŭstralio."

„Multajn dankojn pro la interesa bildaro pri Aŭstrioj vidindajoj, kiun mi donos al miaj amikoj, kiuj intencas viziti Aŭstrujon... Bedaŭrinde nun mi estas tro maljuna, por ree vojaĝi, sed ĉiam Tirolo, Vieno kaj Karintio restos bela memoro al mi. Dum mi skribas mi aŭskultas al la bela festa koncerto el la Festhalle Linz. **E. L. Osmond,** London."

„Via tre ŝatata oficiala organo estas certe unu el la plej legindaj kaj interesaj E.-ĵurnaloj. Mi ŝatas la bildojn kaj la informojn. Sed vere mirinda kiamaniere vi povas eldoni tian ‚Aŭstria Esperantiston", prizorgi pri IEM. kaj aranĝi por tia adresaro. Via energio estas ‚wonderful'! Longe daŭru tia vigleco... **Ella Baldwin-Smith,** Barry."

„...Via gazeto meritas vere laŭdegon. Ĉiam mi bedaŭras, kiam mi jam estas traleginta ĝin. Sed ofte mi legas vian gazeton dufoje, ja eĉ trifoje. Tiu fakto pruvu, ke la enhavo tre interesas. La aperigado de E.-gramatiko en 2te Sprache estas bonega ideo... Ega sukceso kronu viajn laborojn! Josef Maninger, Freistadt."

Novaj gazetoj:

„Kontakto", eldoniĝis aprilo 1937, informilo de Nederlanda Esp.-Centro, Schiedamseweg 209 b, Rotterdam-W.

„Nova Tagiĝo", monata eldono, ekde januaro 1937. Multobligita. Red. Lode Cnops, Broekstr. 21, Heverlee, Belgujo.

Internacia S. O. S. — Bulteno. Monata, informas pri ĉiuj radio-E.-programoj. Kotizo 12 fr. fr., 26 Ave Dode-de-la-Brunerie (Porte de St.-Cloud), Paris 16.

Fraŭlino demandis komedianton: „Diru, kial ĉiuj komedioj finiĝas per edziĝo?"

„Ĉar tiam komenciĝas la tragedio."

Por grupoj kaj unuop.

Amuzo!

De nia konata verkisto Carl Walter, Berlin, ĵus elvenis nova libreto „Gaja ekzerco kaj amuzo", 40 pĝ., tre amuza libreto, rekomendinda al ĉiu, kiu deziras ridi. Ni peras vian mendon. Prezo 90 g.

Vesperkanto.

Muziko de S. Huzii.

Nokto falas en trankvilo
sur tuta placo.
Jen sonorilo
el fora spaco!

Kvazaŭ vok el korazilo
el Di-palaco:
Jen sonorilo
el fora spavo!

Kvazaŭ preĝ en ĥor-trilo
al ĉiel-graco:
Jen sonorilo
el fora spaco!
Penu homo al cel-brilo,
al monda paco.
Jen sonorilo
el fora spaco! K. Kanamatu.

Recenzoj.

Vilém Werner: Homoj sur flosglacio. Komédio en 3 aktoj. El la ĉeĥa originalo trad kaj eld. Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc 1937. 109 paĝoj. Bindita. Prezo 12 kč.

Estas teatraĵo, kiu ankaŭ legata efikas drame. Temas pri la kvar gefiloj de mezlerneja profesoro, kiuj en sia devigita luktado por vivekzistado nuntempa fine konvinkas la patron, ke li per sia denaska honesteco kaj moraleco ne sukcesos en la nuna brutala mono. Unu filo, inĝeniero, devas, aspirante postenon, aliĝi al nova politika partio, la dua filo fariĝas „futbalisto" (!) kontraŭ la volo de la patro; la unu filino, doktorino, post malbone pagita laborado en hospitalo decidiĝas edziniĝi kun laŭmodo „ginekologo" kaj la dua filino, ĝis tiam maŝinskribistino, sukcesas fariĝi filmstelo nur per amindumado al reĝisoro kaj al filmkapitalisto. La kontraŭstaro de la patro kontraŭ la nehonestaj vivovojoj de liaj infanoj estas vana, li vidas ilin forpeliĝi kvazaŭ sur flosglacio, ne povante helpi. Tamen ĉiuj gefiloj per sia moderna vivcelado fine atingas vivtenan pozicion, je amara sento de la malnovepoka patro. Kaj nur pro tiu ĉi netragedia fino („happy end") la teatraĵo povas subtitoliĝi „komedio". Envere ĝi estas dramo de la reala vivo de l'nuna juna generacio (laŭ la antaŭparolo en la libro), „realisme amara bildo de la putranta socia kaj familia vivo sub frakasa premego de la nuna malbonŝanca epoko".

La lingvo de la E.-traduko estas entute bona kaj vivoplena, nur malmultaj eraretoj estas troveblaj: „Futbalo" estas en Esperanto ne permesebla, ĉar „futo" kaj „balo" havas jam aliajn signifojn. Guste „piedpilko". La akuzativo post „eksidi" („eksidi en apogseĝon", p. 17, kaj „eksidi sur fenestron", p. 24) estas ne korekta; korekta ĝi estas nur post „sidiĝi". La artikolo antaŭ persona nomo sur paĝo 31 „post la Hanjo" povas esti preseraro.

La verko estas ege atentinda kaj ĝuinda pro siaj aktualeco kaj vivovereco. Kiel vera artaĵo ĝi ne esprimas ian moralan juĝon, sed simple kaj majstre pentras la nuntempan vivon tia, kia ĝi estas. La verko estu speciale rekomendata al ĉiuj Esperanto-geaktoroj!

Ernst Werner.

„Eksplodo de l'paco", telegramo al la Ligo de Nacioj kaj al la homo, de Edward Ozimek. El la pola lingvo tradukita. Eldono de l'aŭtoro, Warszawa, Dluga 28/47, Polujo. 1937. 15 pĝ., 20 pol. groŝoj.

Interesa por ĉiu homo, kiu malŝatas la militon, lasta alkovo en la broŝuro: „Anstataŭ milito eksplodu do — paco!"

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII., Bandgasse 28.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist“
Mitteilungsblatt für die Mitglieder des **Oesterreichischen Esperanto-Bundes**
und der **I. E. L.-Jugend**

Nr. 8/9 (23/24) Aug./Sept. 1937

Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

POR LA LERNANTOJ

(Por ĉi tiu rubriko ni danke akceptos artikoletojn!)

En Esperanto ofte malbone estas uzataj vortoj, kiuj havas en la gepatra lingvo du sencojn:

„teuer“ kara, multekosta. En diversaj lingvoj, ankaŭ en la germana oni diras „kara“ „teuer“ por „am-esprimo“ kaj „prezo“: Ekz.: La patrolando estas al mi kara. La varo estas multekosta (pli bone ol „kara“). La edzino estas al mi kara. (Ĉu laŭ amo aŭ laŭ la kostoj?) Mi preferus diri: Mia kara edzino estas al mi ne multekosta, ĉar ŝi estas tre ŝparema. (Ĉu ne pli precize ol „Mia kara edzino estas al mi ne kara, ĉar ŝi estas ŝparema.“

„aŭdi, aŭskulti.“ Ofte malĝuste uzataj: Mi promenas sur la strato kaj aŭdas (hazarde, ĉar ne de mi intencite) brueton; mi alproksimiĝas, por aŭskulti (intence) kio okazas. Mi iras en koncerton aŭskulti (ne „aŭdi“) muzikon. Aŭskultu!

Same pri **„vidi, rigardi“**. Mi veturas en la trajno kaj vidas (hazarde) konaton. Fremdulo venas en nian urbon, por rigardi (intence) la belaĵojn.

„Hodiaŭ, nuntempe.“ „Hodiaŭ“ temas pri la hodiaŭa tago, sed ne pri la nuna tempo. Ekz.: Hodiaŭ pluvas, morgaŭ verŝajne estos bela vetero. Nuntempe (ne „hodiaŭ“) regas en la tuta mondo senlaboreco.

Daŭrigota.

Traduktasko por kursfinintoj:

Rakonteto.

James Klein deziris, ke la fama kantisto Leo Slezak kantu en „Komika Operejo“. Slezak skribis pri la salajro.

Klein telegrafis kun pagita respondo: „100 markojn, 1000 salutojn.“

Slezak respondtelegrafis: „1000 markojn, 100 salutojn.“

Spritaĵo.

„Kie estas la plej pra-a parto de la tero?“

„En Wien (Vieno), nome „Pra-tero“ (fama „Prater“, parko kun amuzejoj).

Por pli perfektaj esperantistoj.

Malgranda rakonto. Simile kiel sia fama samtempulo Marc Twain ankaŭ la fama verkisto Rudyard Kipling ŝatis en sia maljunaĝo prezenti al siaj vizitantoj kelkajn verajojn kun pika humoro. Kiam oni iam ekparolis pri la lerteco de la diplomataro, iu el la societo diris, ke Talleyrand estis kreinta saĝan parolon, dirinte: „La lingvo estis donata al la prudenta homo, por kaŝi siajn pensojn.“ — „En tio mi estas aliopinia“, respondis Kipling, „oni devas pli bone diri: por kaŝi sian mankon je pensoj!“

Por komencantoj.

Ĉiu konas fabelojn, kiuj parolas pri magia objekto, kiu donas al la posedanto valorajojn. Li nur bezonas diri certan frazon aŭ rimon kaj la magia objekto funkcias: kokino demetas oran ovon aŭ tablo kovriĝas per bongustaj manĝaĵoj aŭ muelilo muelas ion ajn, kion oni deziras. ktp. La posedanto denove diras kelkajn vortojn kaj la magio ĉesas. Fine la objekto falas en la manojn de persono, kiu ne konas la ĝustan frazon kaj anstataŭ komforton ĝi alportas malagrablajon, anstataŭ felicon — malfelicon.

Nun mi rakontas al vi pri tute moderna magia objekto, kiu donis antaŭ dek jaroj malagreblan surprizon al bakisto en malgranda urbo en Nord-Germanujo. Iumatene li jus estis enmetinta bulkojn en la fornon, kiam oni anoncis al li, ke lia amiko estis antaŭ lia domo kun bela jus aĉetita motorciklo. Li tuj iris sur la straton kaj admiris la novan veturilon. La amiko klarigis al li detale la funkcigon, montris al li la levilojn, dume la bakisto atentege aŭskultis kaj kvazaŭ karesis la motorciklon per siaj okuloj.

„Ĉu vi ŝatas provi la veturadon per ĝi?“ demandis la amiko.

„Volonte“, respondis la bakisto.

Li aŭskultis ankoraŭfoje la klarigojn, obeis la ordonojn kaj jen li estis for. Sed ho ve! Li ne sciis kiel haltigi la moderman maŝinon. Ĉiam rekte antaŭen sur la ŝoseo li veturas. Stranga aspekto, ĉar li estas vestita per blanka ŝirmmantelo kaj blanka bakistĉapo. Li pasis vilaĝon post vilaĝon kaj fine sen akcidento alvenis en urbo 60 km for de sia. Fine la magia objekto haltis, ĉar ĝi ne plu havis benzinon.

La kroniko ne raportas pri la hejmreveno de la bakisto kaj motorciklo. Mi ankaŭ ne scias, ĉu la bulkoj intertempe forbrulis aŭ ĉu iu savis ilin.

Erna Rieckmann-Sindhwad

Iom pri la vortordo.

Grava kondiĉo de bona stilo estas ĝusta vortordo. Kvankam en Esperanto la vortordo estas libera, tamen oni sekvu la logikan vortordon: subjekto-predikato kaj aranĝu la aliajn frazpartojn laŭ ilia aparteneco.

I. La **„a"-vorto** (Eigenschaftswort und eigenschaftswörtliches Mittelwort).

Das Eigenschaftswort kann im Esperanto dem Hauptwort voran- oder nachgestellt werden: nacia lingvo — lingvo internacia. Von mehreren Eigenschaftswörtern kann ein Teil voran-, ein Teil nachgesetzt werden: Azio, la grandega kontinento malnova, multpopola.

Hiedurch lassen sich, wie die folgenden Beispiele zeigen, die unübersichtlichen, schachtelnden Wortstellungen des Deutschen vermeiden:

Der tüchtige, in seinem Fach erfahrene Kaufmann	La kapabla komercisto, sperta en lia (sia) fako
Der freundliche, still sich kräuselnde See	La serena lago trankvile ondiĝanta
Das ganze, in der Ausstellung nicht unterbringliche Material	La tuta materialo ne aranĝebla en la ekspozicio
Die wilde, von Schluchten und Wasserläufen zerrissene Landschaft	La sovaĝa pejzaĝo dissirita de fendegoj kaj akvofluejoj
Der gestern erhaltene Brief oder Der Brief, den ich gestern erhielt*), mich bestürzt } hat	La letero hieraŭ ricevita konsternis min

II. La „e"-vorto (Das Umstandswort).

Das Umstandswort wird in der Regel vor sein Bezugswort gesetzt: Das hast du gut gesagt = Tion vi bone diris. (Aber auch: Tion vi diris bone ist möglich.) tre = sehr wird immer vorgesetzt: Mi tre dankas vin oder Mi vin tre dankas. Ich werde dich niemals verlassen = Mi neniam forlasos vin. Werde ich dich bald wiedersehen? = Ĉu mi baldaŭ revidos vin?

Die geschichtliche, oft besungene Heldentat	La historia heroaĵo ofte prikantita

Längere oder betonte Umstandswörter werden wie im Deutschen nachgesetzt:

Er sprach begeisternd	Li parolis entuziasmige
Er wendete sich erregt um	Li turnis sin ekscitite

Mehrere Umstandswörter werden nicht, wie mehrere Eigenschaftswörter, getrennt, sondern vereint hintangesetzt:

Der Hund bellte klagend	La hundo plende bojis
Der Hund bellte klagend und lang	La hundo bojis plende kaj longe

Legado de bona literaturo plej multe helpas akiri bonan stilon.
Aĉetu kaj legu bonajn librojn!

E. Werner.

*) Ueber die Wiedergabe von Relativ(Beifüge)sätzen durch Mittelwortgruppen im E. wird später Aufschluß gegeben werden.

Humoro de la Esperanto-klaso.

La akuzativa kazo.

La instruanto klarigas la akuzativon. „La litero N-o estas aplikata, por elmontri distinge la rektan komplementon; la suferanton, la ricevanton de la ago en la frazo. Jen estas ekzemplo: Petro batas Johanon. Nu ĉi-ino Ruth, kiu suferas la agon en la dirita ekzemplo?“

Ruth: „Estas Johano, kiu suferas la agon. Estas li, kiu ricevas kaj estas Petro, kiu donas la agon.“

Instruanto: „Tre bona respondo. Jen alia ekzemplo: Paŭlon kisas Heleno. Nu, Johano, kiu suferas la agon en la dirita frazo?“

Johano: „Estas mi, kiu suferas tiun agon, ĉar ne mi, sed Paŭlo ricevas la agon — la kison — de Heleno.“

Nova instrumento kun la sufikso „il“.

Post klarigo, ke la sufikso „il“ montras instrumenton, uzatan por plenumi agon, esprimitan de la radiko, la klasanoj deziras diri ekzercojn kun „il“.

Rudolfo: „La krajono estas skribilo. La kulero estas manĝilo. Oni tranĉas per tranĉilo.“

Marko: „La ludilo, gladilo, kudrilo, tondilo, parfilo, kombilo kaj la krokodilo estas utilaj instrumentoj.“

Instruanto: „Tre bone, sed ĉu vi scias, kie estas la krokodilo?“

Marko: „Jes, Krokodilo estas la instrumento, per kiu oni krokadas.“

La refleksiva pronomo.

Klariginte la refleksivan pronomon „si“ (sia, sin) la instruanto alvokas la klasanojn por diri ekzemplajn frazojn.

Maria: „La bona edzo neniam adultis, sed restis fidela al lia edzino dum sia tuta vivo.“ (La leganto mem decidu, ĉu tiu ĉi gramatike perfekta ekz-o ankaŭ morale estas ekzempla por imiti.)

Johano: „La fripono ŝtelis sian monon el lia monujo, kiu troviĝis en mia poŝo.“ (Oni estu gramatika detektivo por solvi, kiu fakte estas la fripono en ĉi tiu gramatike tute korekta ekz-o.)

IEL-Junularo

Centreo: Wien, I. Neue Burg.

La unua grupo **„IEL-Junularo, Grupo Wien I“** jam ricevis la ŝtatan permeson kaj ekfuncios en oktobro.

Ni petas, ke vi klopodu interesigi gejunulojn inter 14—21 jaroj, aliĝi al IEL-Junularo (en Linz grupo same ekfunkcios en septembro kaj en aliaj lokoj laŭ bezono). La gejunuloj lernos en la grupoj Esperanton kaj aliajn aferojn kaj faros ekskursojn sub gvidado de plenkreskintoj ktp.; sed la gejunuloj ankaŭ poste instigos sian parencaron al lernado de Esperanto. Pro tio granda propagando inter la gejunularo necesa!

Por Federacia Lando **Maksupra Aŭstrio mi** eknomas lernejestron **Hans Huber**, Merkersdorf, Post Ernstbrunn.

Lando-gvidanto.

S-ano Huber travojaĝos grandajn partojn de la lando per sia motorciklo kaj varbos tiamaniere.

Aŭstrianoj, en la intereso de nia movado, kunhelpu kaj skribu al ni.

La Gvidanto por Aŭstrio: Steiner.

Internacia Esperanto-Ligo
ĉefdel. G. Weber, Wien, I., Neue Burg.

Nia bela jarlibro ne sufiĉis por la multaj novaj aliĝoj. IEL decidis tial en sia Komitat-kunsido dum la XXIX-a eldoni komence de oktobro.

Suplementon al la Jarlibro, por konigi la pli ol 400 novajn delegitojn.

Nia afero marŝas! Kunhelpu ankaŭ vi, karaj legantoj! **Aliĝu kaj aliĝigu viajn konatojn.**

Al demandoj bonvolu aldoni resp. afrankon.

Stataj ekzamenoj por instru-kapableco kaj la scipovo de Esperanto komenciĝos la 16. de nov. je la 8 h en Bundeslehrerinnenbildungsanstalt en Wien, I., Hegelgasse 14.

Petskriboj (stampitaj je 1½ ŝ) ĝis plej malfrue la **29. oktobro** al Direkcio de Ekszamenkomisio, Wien, I., Dr.-Ignaz-Seipel-Ring 1.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Reg.-Rat Fritz Stengel
Wien, XVII., Syringg. 3.

Aŭstria Esperanto Asocio.

Ferioj. Pro libertempado de preskaŭ la tuta estraro la laboro estas iom haltigata. Regula laboro rekomencos en septembro.

Aliĝoj. Aliĝis kaj realiĝis en lasta tempo rimarkinda nombro da membroj. Ni dankas kaj atentigas la hezitemulojn, ke aliĝo en aŭtuno pro la grandaj elspezoj duoble valoras.

Jubileo. La aŭtuno de la jubilea jaro montru ĉiujn grupojn kaj izolulojn en plena aktiveco. Inda jubilea festo, aranĝata laŭeble kun AEF-grupo, se tiuloke

iu ekzistas, nenie manku! Sendu raportojn por 2. Sprache.

Flugfolioj. Specimenoj de la novaj flugfolioj, eldonitaj per RoKo jam estis sendataj al grupoj. Dissendo al izolaj membroj okazos komence de septembro. Neniu evitu la malaltajn kostojn, por aĉeti la flugfoliojn kaj la penon, intense propagandi per ili.

Leterpapero kaj postkartoj kun bela propaganda bildo: „Esp. rompas la murojn inter la popoloj", desegnita de s-ano Schnell estos baldaŭ pretaj.

Stampiloj. Por inde stampi la flugfoliojn kaj skribaĵojn, ni rekomendas la aĉeton de taŭga stampilo. Prezo: dulinia S 2.10, trilinia S 2.80. Kolorkuseno S —.80. Mendojn peras AEA.

Sigelmarkoj. Fervora juna samideano fabrikis malmultekostajn sigelmarkojn. Prezo: 100 ekz. 50 g.

Murgazeto. La prezo de la propagandaj tabuloj, menciitaj en la lasta numero estas : tabulo kun tegmenteto blanke pentrita, grandeco 60 × 90 S 8.50; kesteto kun ŝlosebla pordo, sen vitro S 18.—. Ekspoziciplano kaj materialo liverata. Ni ripetas la gravecon de tia konstanta propagando.

Foiro. Per helpo de Esp.-Muzeo sukcesis, ricevi senpage por la ĉi-jara aŭtuna foiro refoje standon por E. ekzpozicio. Gesamideanoj, kiuj — kontraŭ modesta rekompenco — estas pretaj, kelktempe dejori tie kunvenu lunde, 30. aŭgusto, 20 h en kafejo Döbrösy, Judenplatz. Post tiu tempo oni sin turnu al s-ano Ulbrich, Postamt Nordbahnhof.

IEL-ekzpozicio. Hamburg - Amerika-Linie donacis al AEA landkarton por ekspoziciaj celoj, sur kiu estos signitaj ĉiuj lokoj kun IEL-delegitoj per blankaj flagetoj, tre efika propagando. Ni urĝe invitas niajn gesamideanojn en lokoj, kie okazos ĉi-aŭtune ekspozicio au popolfesto peti la permeson (aŭ ni faros ĝin) aranĝi sur muro malgrandan E. ekspozicion, sur kiu oni povas, negardata, pendigi la landkarton. Preterlasu neniun okazon por montri, ke ni vivas!

Cirkulero pri propagando, kursaranĝo kaj aliaj aktualaĵoj estas sendata komence de septembro al grupoj kaj izolaj membroj ekster Wien. Nericevantoj bv. informi nin.

Esperanto-Klub, Wien.

Ni denove kunvenos la **5. de oktobre** en nia klubejo, **Wien, I. Wallnerg. 6** (la pordo dekstre en la vestiblo; sonorigu!). Ni petas, ke multaj venu. Parolos la prez. pri la **Kongreso en Varsovio** kaj sia **vojaĝo al Italujo kun bildoj.**

Meze de oktobro ni komencos en la sama ejo **Esperanto-kurson. Klubanoj invitu viajn konatojn aj ĉi tiu kurso!**

Esperanto-Kursoj per leteroj.

Mi verkos ankaŭ ĉi tiun vintron skribajn E.-kursojn, ĉar mi havis bonan sukceson kaj sufiĉan anaron la pasintan jaron.

Do estos du skribaj kursoj:

a) por **komencantoj,**

b) por **progresintoj,**

ĉiu **po 20** (dupaĝaj grandformataj) **leteroj.**

Ĉiu unuopa **kurso** kostas po aŭstr. **s 2.50** (plus 10 g por poŝtelspezo aŭ 2.50 en poŝtmarkoj).

Hejmtaskoj volonte korektotaj **senpage!**

Anoncu vin baldaŭ, sendante la monon!

La kursoj komenciĝos la **15. de oktobro!**

Kort. kons. Steiner, Wien, I. Neue Burg.

Eksdirektoro kaj nuntempa administranto Hans Jakob de UEA-Genève faris en E.-societo **Danubio** en **Wien,** kies prezidanto s-ro Čech estas la ĉefdelegito por Aŭstrio, paroladon la 28. julio. Ĉar ni ne ricevis informon nek inviton, ni ne povas raporti pri la okazintaĵoj.

S-ro Hans Jakob faris ankaŭ viziton al la prezidanto de Int. Esperanto-Muzeo en Wien, kort. kons. Steiner.

Jubileo-poŝtkarto kun bona bildo de Zamenhof eldonis Aŭstria E.-Federacio, Wien. La arta skizo estas de Hermine Gaugitsch.

Al la grupoj kaj ĉiuj niaj legantoj!

Sendu al ni afable raportojn, krome mallongojn rakontojn, kiujn ni volonte — eventuale kun bildoj — volonte publikigos, se ili estas interesaj.

Sed, samideanoj, **varbu** ankaŭ por nia organo, kiu depost unu jaro eliras en tutmondon.

Samideane: La red.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.